

# THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of the British Esperanto Association.

VOL<sup>o</sup> VI. N.<sup>o</sup> 70.

OKTOBRO, 1910.

PREZO 3 PENCOJ.

## KOSTO DE ABONO, AFRANKITE.

### EN GRANDA BRITUJO.

Por unu jaro	3 ŝilingoj.
Unu numero	3 pencoj.

### EKSTERLANDE.

Por unu jaro	\$0.75, fr.4, M.3.
Laŭ Internacia Mono	Sm. 1.50.

Abonoj estas akceptataj ĉe la komencigo de ĉiu monato, kaj devas esti pagataj per postomandato aŭ Ĝekbanka transpagilo. Sin turni al la Sekretario, 133-136, High Holborn, London, W.C.

### REDAKCIO.

Manuskriptojn, k.t.p., oni bonvole sendu al la Redakta Komitato, 133-136, High Holborn, London, W.C.

Pri artikoloj la Komitato rezervas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.

Ordinare oni ne povas resendi artikolojn neakceptitajn.

### ANONCOJ.

Pri Anoncoj, sin turni al la Direkcio, THE BRITISH ESPERANTIST, 133-136, High Holborn, London, W.C.

### ENHAZO.

	PAGO
Kongresa Parolado de D-ro Zamenhof	181
La "Sesa Kongreso" en Washington. W. MANN	184
Sur la "George Washington"	185
Novjorko	186
Individualismo aŭ la Socio?	187
Zamenhof Alvenas	188
La Malferma Kunsido	189
La Lingva Komitato	190
Esperanto ĉe la Laboristaro	192
Statistiko pri la Kongresanoj	194
Niagara	196
En Montrealo	197
Kongresa Decidaro	197
Impresoj pri Augsburg. H. B. MUDIE	198
Brita Kroniko	199
Libraro kaj Gazetaro	199
The Board of Education and Esperanto	200
New Members, Fellows, Examinations, F.K.I.	200

## Parolado de D-ro L. L. Zamenhof

### ĉe malfermo de la Sesa Kongreso Esperantista en Washington,

Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas felica, ke la sorte permisis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo en ŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuragon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj gis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Poco de tiu miksevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas divergentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni

komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiliigi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al ni kaj farigos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos varia, sed ĝi baldaŭ ehe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, Esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna Kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havus signifon por la tuta Esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia Esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence germos kaj kreskos, kaj en via

lando nia afero baldaŭ havos siajn plej fervorajn kaj plej gravajn apostolojn.

\* \* \* \* \*

En via lando, Usonaj samideanoj, nia afero estas ankoraŭ tro juna, kaj multaj el vi ne ellaboris al si ankoraŭ tute klaran jugon pri ĝi; tial permesu, ke mi almenaŭ *iom* esploru antaŭ vi la vojon, kiun ni iras.

Kion celas la Esperantista movado? Gi celas atingi reciprokan komprendon inter ĉiuj homoj kaj popoloj. Por kio ni bezonas tian reciprokan komprendon? Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi? Kial ni deziras, ke ĝi estu nepre sur fundamento neŭtrala? Kial ni tiel persiste laboras por ĝi? Kia estas la spirito, kiu nin ĉiujn ligas inter ni? Pri ĉio ĉi tio mi jam multe parolis, kaj mi ne volas nun ripeti miajn vortojn, des pli, ke ĉiu el vi post kelka meditado facile mem trovos la respondojn. Antaŭ vi, praktikaj Amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome, ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute *certa*, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana? Nur plena konscio pri la irota vojo donas al la marsantoj sufice da energio, por kontraŭbatali ĉiujn malfacilajojn, kiuj troviĝas sur la vojo.

La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj: aŭ per laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Kia devas esti la karaktero de la unua vojo, pri tio neniu povas dubi; pri afero, kies tuta esenco kaj vivo estas bazita sur interkonsento, ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unuanime. En tia afero, se ĝi per si mem montriĝas vivipova, konkordo estas la plej certa garantio de senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton. Tion komprenas tre bone niaj samideanoj, kaj tial ili kun indigno forpuſas ĉiun, kiu volas delogi ilin de la komuna vojo. Sed iufoje en la kapo de tiu aŭ alia samideano aperas la sekvanta demando: kio estos la sekvo, se la solvon de la internacilingva problema volos iam preni sur sin ia granda *forto*, kontraŭ kiu ni ĉiuj estas tro senfortaj, ekzemple la registaroj de la mondo? Ĉu ni devas timi, ke ili eble elektos alian solvon, ol ni elektis, kaj tiamaniere nia tuta laborado fariĝos vana?

Por trovi klaran respondon al tiu demando, ni prezenti al ni, ke la registaroj de la mondo aŭ iaj aliaj grandaj kaj influaj potenco starigis aŭtoritatan komitaton, kiu devas decidi, kia lingvo devas fariĝi internacia. En la artikolo

"Esenco kaj Estonteco," kiun multaj el vi legis en la "Fundamenta Krestomatio," mi analizis tiun demandon detale kaj mi montris tute klarition, pri kio en la nuna tempo jam neniu esploranto dubas, nome, ke tia komitato, pri kio mi parolis, neniel povus elekti ian lingvon nacian, nek ian lingvon mortintan, nek ian lingvon kun plene elpensita vortaro, sed ĝi devus nepre elekti nur aŭ Esperanton en ĝia nuna formo, aŭ Esperanton iom ŝangitan. Se la komitato, kontraŭ ĉiuj postuloj de la prudento, volus fari ian alian decidon, ĝia decido restus nur decido papera kaj praktike absolute senvalora. Nun ni rigardu, kia estus la sola maniero, en kiu la komitato povus solvi la lastan alternativon.

Plej nature kaj plej kredeble estas, ke la komitatanoj rezonados simple en la sekvanta maniero: "Ekzistas lingvo artefarita, kiu montriĝis tute vivipova, bonege funkciata, bonege sin tenas jam multe da jaroj, kreis gravan literaturon, ellaboris sian spiriton kaj vivon, k.t.p.; sekve anstataŭ fari tute senbezona kaj sencele riskajn novajn eksperimentojn, ni simple akceptu tion, kio jam ekzistas, ni donu al ĝi la aŭtoritatan apogon de la registaroj, kiujn ni reprezentas, kaj tiam la tuta eterna problemo estos tuj plene solvita, kaj de morgaŭ la tuta civiliza homaro reciproke sin komprenos."

Tia, mi ripetas, estas la plej natura decido, kiun ni povas atendi de la registare elektata komitato. Sed ni supozu, ke la komitato trovos, ke diversaj ŝangoj en Esperanto estas efektive tre *necesaj*. Kiel do ĝi agos?

Antaŭ ĉio ĝi sin demandos, ĉu ĝi estas sufice *forta*, por altrudi sian teorian volon al tiuj multaj miloj da homoj, kiuj ĝis nun estis la solaj laborantoj en la afero. La Esperantistoj laboris dum longa vico da jaroj, multe laboris, multe oferis kaj kun tre granda malfacileco fine akiris tion, kio dum multaj miljaroj ŝajnis neakirebla kaj kio, unu fojon perdiita, neniam plu reakiriĝus, ĉar la mondo perdus la tutan konfidon al la internacilingva ideo. Sekve ĉiu prudenta kaj honesta komitato dirus al si: "Ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu por ĉiam." Se la komitato scius, ke ĝin elektis ekzemple nur ia unu tre malgranda kaj malgrava landeto, ke la elektinto tute sin ne interesas pri la afero kaj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon ĝin subteni, nek la forton por tio, tiam prudentaj komitatanoj nur simple esprimus sian opinion kaj dezirojn pri diversaj farindaj ŝangoj en Esperanto kaj lasus la akceptadon aŭ neakceptadon al la decido de la Esperantistoj mem, sed neniam komencus konkuron kontraŭ la Esper-

antistaro, ĉar ili komprenas, ke morale tio estus nur krimo kontraŭ la internacilingva ideo kaj praktike ĝi pli aŭ malpli frue kondukus nur al fiasko.

Nun ni supozu, ke por la decido de la demando pri lingvo internacia estas kreita komitato, kiu havas forton ne *fikcian* sed *efektivan* kaj *grandan*. Antaŭe mi jam montris, ke se tia komitato ne volos, ke ĝia decido restu praktike absolute senvalora, ĝi povos preni nur aŭ Esperanton, aŭ ion tre similaran al Esperanto. Mi diris jam, ke plej kredeble ĝi akceptos simple Esperanton en ĝia nuna formo. Sed ni supozu, ke ĝi tion ne volos fari; kiel do ĝi agos? Ĉar ĝi komprenos tre bone, ke por krei vivipovan lingvon tute ne suficias esti instruita homo kaj diri al si "Mi kreos"; ke oni ne povas tion fari laŭ mendo en la daŭro de kelke da semajnoj; ke tio postulas tre longan, fervoran, sindoneman, amoplenan laboradon, elprovadon, trasentadon, k.t.p.; kaj ĉar ĝi scios, ke ekzistas jam lingvo, super kiu multe da homoj tre longe laboris, kiu havas multejaran historion, grandan literaturon kaj tutan vivon, ke tiu lingvo bonege funkcias, kaj nur malmultaj punktoj povas en ĝi esti disputeblaj; tial estas tute kompreneble, ke se la komitato traktos sian taskon serioze, ĝi ne riskos preni sur sin mem la kreadon de tute nova lingvo, nek prenos alian lingvan projekton, kiu la vivo ankoraŭ ne sufice elprovis, ne komencos tute senbezone, sekve neprudente bataladon kontraŭ tiuj, kiuj ĝis nun laboris en la afero, sed ĝi prenos Esperanton kaj faros en ĝi tiujn ŝangojn, kiujn ĝi trovos necesaj.

Al kiu la komitato komisius la faradon de la ŝangoj? En la tempo *prepara*, kiam estus necese esplori principe la demandon, *kian* lingvon oni devas elekti, la komitato povus komisi la laboron al kiu ajn, zorgante nur, ke la elektitoj estu homoj prudentaj kaj senpartiaj kaj komprenu la tutan respondecon, kiu ili prenas sur sin. Sed kiam la lingvo estus jam elektita kaj oni decidus fari en ĝi ŝangojn, kun kiu oni konsiliĝus pri tiu laboro? La plej simpla prudento kaj la plej simpla komprendado de sciencaj metodoj diras, ke pri tia laboro oni devus konsiliĝi ne kun personoj, kiuj konas la lingvon de *ekstere*, sed antaŭ ĉio kun personoj, kiuj plej bone konas la lingvon *interne*, kiuj plej multe *laboris* por ĝi, plej multe praktike ĝin *uzis* kaj sekve havas en ĝi plej grandan sperton kaj plej bone konas ĝiajn mankojn *efektivajn*. Ĉiu komprenas tre bone, ke fari ŝangojn en iu lingvo, gvidante sin nur per ekstera ŝajno kaj ne konsiliĝinte kun personoj, kiuj plej bone konas tiun lingvon, estas tia infanaĵo, kiu certe nenia komitato povus fari, se ĝi traktus sian taskon serioze kaj ne estus

sugestiata de personoj, kiuj havas ian kaſitan celon.

Kaj se la komitatanoj decidos fari ŝangojn en Esperanto, kion ili povos ŝangi? Se ili ekzemple volos diri, "Tiu vorto estas prenita el lingvo, kiun parolas cent milionoj, tial ni eljetu ĝin kaj prenu vorton el lingvo, kiun parolas cent dudek milionoj," aŭ se ili dirus, "Al ni ne plaĉas la vorto 'estas,' ni preferas 'esas,'" k.t.p., tio estas ja simpla infanaĵo, kiu seriozaj homoj certe ne permesus al si, ĉar ili komprenas, ke en lingvo, kiu havas jam multejaran vivon, ŝangi grandan amason da vortoj pro simpla kaprico, pro ia pure teoria kaj praktike absolute senvalora motivo estus sensencajo. Memorante, ke oni atendas de ili ne ian teorian filologian amuzigon, sed laboron *praktikan*, ili kompreneble ŝangus nur tiajn vortojn aŭ formojn, kiuj montriĝis kiel malbonaj *per si mem*, malbonaj *absolute*, grave malopportunaj por la *usantoj* de la lingvo. Sed se vi trarigardos ĉiujn kritikojn, kiuj estis faritaj kontraŭ Esperanto en la daŭro de dudektrijaroj — kaj Esperanton ja kritikis jam multaj miloj da homoj, kaj certe neniu eĉ plej malgranda el ĝiaj mankoj restis kaſita — vi trovos, ke la grandega plimulto el tiuj kritikoj estas simple personaj kapricoj. La nombro de tiuj ŝangaj proponoj, kiuj efektive povus havi ian praktikan valoron, estas tiel malgranda, ke ili ĉiuj kune okupus ne pli ol unu malgrandan folieton, kiu ĉiu povus ellerni en duonhoro; sed eĉ inter tiuj tre malmultaj supozeblaj ŝangoj la plej gravaj estas nur *plibonigo ŝajna*, sed en efektiveco ili post pli matura pripenso montriĝus eble nur kiel malplibonigo. Tiel ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion mi antaŭ dekses jaroj proponis, por liberiĝi de la tormentantaj kaj faciligi la propagandon, kaj kion postulas la plimulto de la reformistoj, tiu ŝango en la *nuna* tempo, kaj tiom pli antaŭ la okuloj de registare starigota kaj sekve fortون havanta komitato, devas aperi kiel tute ne akceptebla, ĉar ĝi prezentus kripligon de la *interna* valoro de la lingvo, por plaĉi al ĝiaj *eksteraj* rigardantoj, forigon de necesaj gravaj sonoj el la lingvo kaj de libera vortordo kaj klareco por... ke la presistoj ne bezonu elspezi kelke da spesmiloj kaj la komencantoj ne hayu kelkan malfacilaĵon.

Se vi prenos ian artikolon Esperantan, prezentitan de niaj kontraŭuloj, por senkreditigi Esperanton, vi preskaŭ ĉiam trovos nur unu aferon: grandan amasigon de la plurala finigo "j"; tiu malfeliĉa "j," kiun neniu tamen kuraĝas kritiki en la bela greka lingvo, estas la kvintesenco de ĉiuj terurajoj, kiujn niaj kontraŭuloj montras en Esperanto!

Unuvorte, ĉiu el vi povas facile konvinkigi,

ke se iam registare starigota komitato decidos fari ŝangojn en Esperanto kaj se tiu komitato traktos sian taskon serioze, ĝi povos ŝangi en Esperanto nur tre, tre malmulte; la postkomitata Esperanto restos tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata, nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arhaismoj kaj cedos sian lokon al pli oportunaj formoj, neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ĝi ĝis nun akiris. Tio estas ne nia pia deziro, sed tion plene certigas al ni simpla logiko kaj prudento, kontraŭ kiu certe nenia serioza komitato volos peki, se ĝi ne volos, ke ĝiaj laboroj restu absolute sen ia praktika rezultato.

Nun mi resumos ĉion, kion mi diris. Logika esploro de la afero montras al ni, ke:

1. Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2. La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t.e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arhaismoj.

3. Se iam aperos la neceso fari en Esperanto ian ŝangon, tiam povas fari nur aŭ la Esperantistoj mem, per komuna interkonsento, aŭ ia grandega forto, sed nepre kun plena interkonsento kun la tutaj Esperantistaroj.

4. Se jam la Esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidos fari en Esperanto iajn ŝangojn, tiuj ŝangoj povas esti nur ekstrema malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros.

Tio estas la sole ebla natura irado de la aferoj. Ĉiu, kiu volas kontraŭbatali tiun naturan iradon, nur perdos senbezona siajn fortojn. La Esperantaj radikoj de la arbo internacilingva jam tiel profunde penetris en la teron de la vivo, ke ne povas jam ĉiu deziranto ŝangi la radikojn aŭ ŝovi la arbon laŭ sia bontrovo.

Karaj kongresanoj! Ĉio, kion mi diris, ne estas ia aŭtora memfido, ĉar mi plene konsentas kaj konfesas malkaſe, ke, por ŝangi ion en la natura irado de la internacilingva afero, mi estas tiel same senpova, kiel ĉiu alia persono. Mi defendas fervore nian nunan vojon nur tial, ke tio estas la sola vojo, kiu kun plena certeco alkondukos nin al nia celo. Kiu ajn volus ŝangi la naturan iradon de la internacilingva afero — tute egale, ĉu li estas malamiko de Esperanto aŭ ĝia plej firma amiko, ĉu li estas sensamulo aŭ eminentulo, ĉu li agas per vortoj aŭ per mono kaj ruzajoj, ĉu li estas plej fanatika konservemulo aŭ plej facilanima eksperimentisto de novajoj, ĉu li estas plej pura idealisto aŭ plej profitama egoisto, ĉu li bruas kaj malbenas aŭ kaſite laboras sub la tero — li neniam sukcesos; li povos nur krei kelktempa skismon kaj akiri la malĝojan gloron de malhelpanto kaj subfosanto, sed neniam li povos devigi ĉiujn amikojn de la internacilingva ideo pro iaj sensignifaj bagateloj forjeti tion, kion ili posedas, kio montrigis plene vivipova, en kion estas jam enmetita tia multego da laboroj kaj da vivo kaj kio per natura vojo devas iom post iom konstante ensorbi novajn sukkojn. Tion devas bone memori ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de lingvo, internacia, kaj se ili tion ne memoros, la vivo mem donos al ili la necesan instruon.

Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoge tre mal-facila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj legoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton. Al la Sesa Esperantista Kongreso, kiu sendube enjetos multe da semoj en la teron Amerikan, mi eldiras mian koran saluton.

(Proksiman monaton ni donos la anglan tradukon, kiu pro manko de spaco ni ne povis enpresi en ĉi tiu numero.—RED.)

## La Sesa Internacia Kongreso de Esperantistoj.

WASHINGTON, 14-21 SEPTEMBRO, 1910.

(Bildoj el la Notlibro de Ceestinto.)

vojagajn havis? Ĉu la Kongreso estis sukcesego? Ĉu vi marmalsanis? Ĉu vi vidis la ĉielskrapilojn? Ĉu Niagara ankorau fluas? Kion vi opinias pri Ameriko? Kion—

— Nu, mia kara, atendetu kun via pluvo da ĉu kaj kiel kaj kio, kaj vi sion aŭdos! Mi ne povas la tuton diri per unu spiro! Kaj restas ja en mia kapo tiom da impresoj, ke nefacile estas elekti, per kiuj el ili komenci. Ni tamen provu!...

Kaj post unu kvaronhora periodo de po-demanda elcerpado por unu amiko, kaj dua eldono sam-demanda por dua amiko, kaj tria ekstra-ekstrakto por tria:

— Nu, sufice! Jen vi havis almenaŭ ekvidon sur la kongresaj travivitajoj. Nun vi devos pacience elteni,

— Ĝis revido en Washington!  
Tiel mi parolis, kun serena optimismo, kiam mi lastan jaron adiatis en Barcelono Usonan samideanon... kaj poste en la daturo preskaŭ de tutaj jaroj restis nescianta, ĉu jes aŭ ne mia espero plenumigos.

Sed mi havadis fidon...

Kaj jen, fine, la sorto — dank' al multe satita kunkelpado de kelkaj britaj samideanoj! — sin montras bravegula. Montrigis, ke estos mia dolĉa devo, vojaĝi Amerikon por la Sesa. Hip, hip, hip, huraaa!

Min revenintan post la Kongreso al Londono akceptas avida demandaro de la amikoj:

— Ha, jen vi denove? Kiel vi farias? Ĉu vi felicen

gis aperos la Oktobra BRITISH ESPERANTIST. Tie vi povos esplori la tutan galerion de l' Washington'aj bildoj laŭ via plaço...

Jen la unua:

\* \* \* \*

*Sur la V.S. "George Washington,"  
Merkredon, jan de Aŭgusto, vespere.*

Kiel rapide pasis ĉi tiu unua tago! Kiom tamen da agrablaj momentoj oni travivis! Kaj kiel klare ĉiu okazeto restas en mia memoro! La frua levigo kaj manĝeto en Hampstead, la blua matena ĉielo kun ĝia promeso pri bona tago, la entubigo por Waterloo, la renkontigo en la lifto kun stelpontanta samideano, kiu afable kaptas mi el miaj neniel malpezaj valizoj, la areto de amikoj apud la jam atendanta speciale vagono. Jen S-ro Abiko el Tokio parolanta kun kelkaj samlandanoj siaj, jen la ŝercopreta Harrison Hill, jen F-ino Lawrence, F-ino Schafer, kolego Millidge, kaj aliaj, ĉiuj gojaj pri la penso, ke ili baldaŭ vidos la karan Majstron sur la "George Washington," kaj povos saluti lin antaŭ ol li forveturos kun la aliaj feliĉuloj Novjorkon. Ceestas ankaŭ D-ro Pollen, kaj kun li, kompreneble! la fama multe vojaĝ-inta kaj -onta verda standarde, por kiu veturado trans la Atlantiko estas nura bagatelo... Envagonigu! krias la konduktoro, kaj dum ni ĉiuj eligardas tra la vagonaj fenestroj, alkuras lastamomento S-ro Stead por diri bonvojaĝon kaj transdonigi saluton al la Majstro. Li ankaŭ alportas la sciigon, ke S-ro Will Thorne hodiaŭ demandos publike en la Parlamentejo en Westminster, ĉu estas vere, ke la Brita Registaro ricevis de la Usona Ambasadoro inviton sendi delegiton alla Sesa. (Iliaj Registaraj Moſtoj ja ricevis, sed ne sendis!)

Sed jen ni movigas — kaj baldaŭ, sub la influo de la mallaŭta rulbruado de la vagonaro, la vidado de la preterflirtanta pejzaĝo, kaj agema fantazio, nin ekkaptas tiu agrabla entuziasmo kaj sorĉiteco, kiun konas ĉiu kongresen vojaĝanto. Nia gajeco farigas ankoraŭ pli granda, kiam S-ro Abiko afable diras al ni japanan propagandan paroladon pri Esperanto. Multajn interesajn aferojn li rakontas al ni pri sia malproksima lando, oni babiladas, ŝercas — kaj jen ni estas jam en Southampton!

Sekvas la kutima ekscitigeto pri la pakajoj, kiomeco de trinkmono, k.t.p., kaj post kelkaj minutoj ni estas instalitaj kun la ceteraj pasageroj kaj amikoj sur la servoſipeto, sur kiu ni faros la kelkmejlan vojaĝeton al la "George Washington," jam renkonte al ni rapidantaj el la sudo trans la bele dancantaj ondoj de Southampton Water. Ŝipo estas ĉiam tre taŭga propagandejo, kaj kompreneble nia bando da fervoruloj ne preterlasas la okazon! Dume la maſinoj bone laboras, la hela sunlumata marpejzaĝo rapide preterglitas kun siaj por ne-maristoj ĉiam tiel interesaj vidaĵoj, kaj baldaŭ ekhaltiĝo kaj sirena ekfajfego montras, ke nia ŝipo proksimigas al sia celo. Jen antaŭ ni levigas el la akvo la imponanta formo de granda transatlantikulo, kontraste kun kies giganta maso nia servoſipeto ŝajnas infana ludilo. Vico super vico altigas ĝiaj ferdekoj, amase borderitaj de la multaj pasageroj, kiuj en ŝipigis jam en Germanujo. Ankoraŭ ne albordigante ni aŭdas de iu tie supre en la aero laŭtan Vivu Esperanto! kaj vidas la konatan flagon! Avide ni rigardas kaj vigle resalutas:

— Jen la Majstro! ekkrias unu, kaj ni baldaŭ povas klare distingi konatajn vizagojn: D-ron kaj S-inon Zamenhof, D-ron Mybs, D-ron Arnhold, S-ron Winkelmann, kaj apud ili aliajn, anglajn samideanojn el Portsmouth, Southampton, Plymouth, kiuj profitis sian pliproksimecon por alveni plifru. Eksonas salute "La Espero." La entuziasmo de nia samideana renkontigo videble interesas la ne-Esperantistojn, kiuj de ĉiuflanke alrigardas.

Hurá! fine alfiĝas la pasponto, rapide ni

portigas kajutem niajn valizojn, kaj iras supren por partopreni en la ekkongreseto, kiu okazas sur la ferdeko ĉirkaŭ la Majstro. Felicaj momentoj! kiam oni — eble por la unua fojo — vidas la karan personon de tiu homo, kiu tiel takte kaj pacience gvidadas nian aferon tra tiom da nefacilaj lokoj... Eble homoj de seka temperamento iom miras pri la entuziasmo kaj amo, kiun vekas ĉe la ordinara Esperantisto la nomo de Zamenhof; sed ĉu mirinde estas, kiam oni pensas pri la felicaj spertoj, la koraj kamaradigoj, la plivastigoj de spirito, kiujn oni ŝuldas al la kara lingvo, ke la Esperantistaro ĉiulande honoras kaj respektas ĝian elpensinton, tiom pli kiam ĉi tiu estas homo tiel bonkora kaj senafekte modesta, kiel la Doktoro?

Sed — la tempo kaj la tajdo neniu atendas, diras angla proverbo, kaj senkompara sonorado anoncas, ke la nepasageroj devas nun forlasi la ŝipon. Adiaŭ! Gis revido en Antverpeno! oni sin konsolas — kaj post tri-kvar minutoj, ni feliĉuloj vojaĝontaj Amerikon rigardas malsupren al la jam debordiganta servoſipeto. Ĉe ĝia malantaŭa parto kolektiĝis — iom malĝoja pro la disigo — la areto da gesamideanoj, kiuj venis por forsaluti nin. Sed ili tuj regajigas, kiam S-ro Harrison Hill — sentante ke por Esperantistoj, ĉiukore kaj ĉiulande kunigitaj per la interna ideo de la Esperantismo, efektive disigo ne ekzistas — per forta voĉo ekkantas kun ili "La Espero." En tiu sento ni rigardas ilin iom post iom malaperi, ankoraŭ per manoj kaj tukoj ilin adiaŭante.

Kaj tiun scenon ni lasu kiel lastan bildon de nia unua tago: Tiuj reportataj hejmen kantante "La Espero," kaj ni kun la koroj turnitaj al la vasta Okcidento, veturante Amerikon sur tiu grandega ŝipo, kiu per sia rapida kaj potenca antaŭenirado bone taŭgas kiel simbolo por la nehaltigebla progresado de Esperanto...

\* \* \* \*

*Sur la Atlantika Oceano,  
Mardon, 9-a de Aŭgusto.*

Jam ses tagoj sur la maro!

Ses felicajn tagojn, ĉar sur ĉi tiu grandega ŝipo (27,000 tunoj) oni rapide kutimigas al la marmovado. Nur en la du unuaj tagoj mi sentis ian neagrablan genon kaj pezecon, sed poste mi povis ĝui la bonegan frešan maraeron kaj la ŝipan vivadon en plena ĝojo.

Kaj la vivo sur la ŝipo estas efektive tre interesa. La mirinda kaj detala organizado de la ŝipaferoj, la tiel diversstipaj kaj diversgentaj pasageroj, la ĉiam ŝangīganta aspekto de la vasta ĉirkauanta maro, la regula sed tute ne teda ĉiutaga rutino, ĉio ĉi tio donas al la nehardita vojaĝanto tiom da novaj kaj agrabla impresoj, ke kvankam ni estas sur la oceano jam de unu semajno, ŝajnas al mi ke aperaŭ hieraŭ ni vokis adiat al la samideanoj, kiuj venis premi la manon al la Majstro en Southampton.

Nia Esperantista kompanieto ĉi tie formas ja veran rondeton familiar. Ni estas entute deksep: D-ro Zamenhof kaj lia edzino (ambaŭ, vi ĝojos atidi, en tute bona farto kaj gaja humoro), D-ro Mybs, D-ro Arnhold, kaj S-ro Sergius Winkelmann el Germanujo, S-ino Essigmann el Varsovio, delegitino por Polujo, S-ino Tiard, F-ino Martin kaj S-ro Chauveau el Francujo, S-ro Gottschall el Aŭstrio, S-ino Theodore el Kimrujo, F-inoj Hutchinson, Thomson kaj Higgs el la Londona Klubo, Kolonelo Pollen (kaj la flago!), S-ro Richard Sharpe el Torquay, kaj mi mem.

Granda transatlantikulo kia la "George Washington" estas ja mirinda! La pasageroj estas sufice-nombraj por mem formi urbeton. Estas 430 unuaklasaj, 420 duaklasaj kaj preskaŭ 500 triaklasaj, kaj plue 900 elmigrantoj, en la kvara klaso. Aldonu ankoraŭ kelkcent por la maristaro, kaj oni vidas, ke kunvojagas sur ĉi tiu ŝipo preskaŭ 3,000 homoj!

Vi povas prezenti al vi, kian sistemian organizadon kaj rutinon postulas la komforta logigado, nutrado kaj distrado de tia amaso. Sub la komplexa gvidado de la

ĉefservisto nia Esperantistareto faris "ekskurson" de inspektado. Unue la kuirejon, kun siaj miloj da vazo, siaj zorge dismetitaj fakoj : bakejo, lavejo, k.t.p. Ĉio estas arangita plej kompakte kaj praktike. Oni eĉ havas aŭtomatajn ovkuirilojn, kiuj varmigas la ovojn laŭ tri gradoj de mangdeziro : molaj, meze firmaj, kaj firmaj! Malsupren ni alvenis en la tenejo, kie oni konservadas la mangajojn fresaj dum la tuta vojago. Tra dikega kvazaŭkofra pordo oni penetras en glacian temperaturon, kaj vidas la neklarajn formojn de grandaj viandopecoj pendantaj de la plafono. (Tiu vizito ja multe vundis miajn vegetarianajn okulojn kaj nazon, sed min revivigis la fruktejo!) Poste, ankoraŭ malsupren laŭ aliaj kolrompaj kaj glitigaj metalaj ŝtuparoj, ĝis la mašinejo, kie senĉese funkcias tage kaj nokte potencaj cilindroj kaj radoj, por nin portadi sekure kaj certe antaŭen po rapideco de 20 mejloj en horo. En tiu submondo laboras ja por nia komforto tuta regimento da homoj...

Eksursante pluen en la trian klason, ni havis la plezuran surprizon, trovi S-ron Henry, membron de la Varieta Ligo Esperantista. Tie nia vojaĝeto devis fini, ĉar en la kvaran klason, pro emigraciaj leĝoj, oni ne permisas aliklasanojn eniri.

Bildojn pri la luksa arango de la kajutoj, salonoj, mangohaloj, lumčambroj, k.t.p. sur tiaj transmaraj ŝipoj, ĉiu povas vidi en la prospekto de kiu ajn vojaĝkompanio. La prospektoj ne trograndigas. Sidante vespere en la belega unuaklasa koncertsalono, sur karesemola kanapo, kaj aŭskultante la dolĉan muzikon de iu granda virtuozo fidele reproduktatan de la elektra piano, oni efektive malfacile kredas, ke ĉie ĉirkaŭe estas la vastega maro, ondanta en senĉesa maltrankvileco. Se oni volas legi aŭ skribi, ekzistas tre eleganta saloneto kun ĉio necesa, kaj eĉ speciala ĉambreto, kie oni povas senpage uzi skribmašinon.

Ankaŭ por sin distri ne mankas rimedoj. Ĉiuvespera la ŝipa orkestro (konsistanta el la kelneroj kaj kuiristoj, kiuj vin servis dum la tago) ludas en diversaj partoj de la ŝipo. Unu vesperon estis danco, en kiu mi vane provis venki la malfacilajn de la Amerikaj "du-pašo" kaj "valso." Por la pli atletaj (en la unua klaso!) troviĝas, sur la plej supra ferdeko, elektre funkcianta gimnastikejo, kun ĉiaj plej lastaj aparatoj, de selo kiu vin sidskuas kiel kamelo, ĝis masaĝiloj kiuj vin frapetas aŭ frapegas laŭ plaĉo. Apude, sur larga sunferdeko, vi povas ludi ringojetadon aŭ ŝovbilardon. Kiam vi lacigas pri tio, vi povas vigle marŝadi sur la bonegaj promenejaj ferdekoj, kaj fine vin sterni sur ferdeka kušosego (unu dolaron por la vojaĝo!) kaj rigardadi la maron en dolĉa revado, ĝis la ĉiam plezuriga sono de la mangosonorilo vin logas volontegan al la tablo — por fari pluan lertan vegetaranan kombinaĵon el nevegetarana menuo!...

Malgraŭ nia rilate malgranda nombro, ni Esperantistoj faris tre multe da propagando sur la ŝipo. D-ro Mybs kaj Kolonelo Pollen faris tre interesajn paroladojn en germana kaj angla lingvo en la unua kaj duaklasaj salonoj, ni presigis specialajn propagandajn artikoletojn en la ŝipgazeto (ekzistas ja speciala presejo por tio kaj la menuoj, k.t.p.), kaj la bonege flagornamita Zamenhofa tablo en la mangosalono servis kiel ĉiama rememorigilo por la diversnacia gastaro. Ankaŭ inter la multaj novaj amikoj, kiujn oni ĉiam faras sur ŝipo, oni vekis multe da intereso pri nia lingvo, kaj eĉ donis komencajn lecionojn. Ĉe la librovendejo — kie vi povis aĉeti ĉiaspecajn gazetojn kaj revuojn — oni elmetis Esperantajn lernolibrojn, kaj promesis mendi pluajn provizojn. Tiel per nia vojaĝo jetigis multe da Esperanta semo. El ĝi kresku bona frukto! Ŝipo estas ja idealaj propagandejo. Baldaŭ, tamen, ni devos ĝin forlasi. Jam morgaŭ, oni diras, ni atingos Novjorkon...

\* \* \* \*

*Novjorko, vendredon, la 12an.*

Efektive, Novjorko estas interesa urbo. Sed ni estas

ĉi tie nur de merkredo, kaj jam morgaŭ ni devos foriri. Du tagoj apenaŭ por elĉerpi ĉion vidindan kaj vizitindan en urbego kia Novjorko! Sed mi kredas, ke mi bonege utiligis la mallongan tempon, kiun mi disponis. Almenaŭ mi forportos multegon da novaj impresoj, agrablaj kaj malagrablaj.

La unua impreso estis tute agrabla, kiam sub helblua ĉielo ni sur la "George Washington" proksimigis al la haveno kaj vidis klare la grandegajn multetaĝajn konstruaĵojn, en kiujn la Novjorkanoj sisteme koncentrigas sian komercan vivon. Kontraŭ ili la fama statuo de la Libereco, kiu staras kun levita torĉo apud la enirejo, ŝajnas iel negranda kaj senpotenca. En imponanta aro ili staras tie, mirigaj simboloj de homa progresado kaj aspirado. Dum ni iom post iom alvenas, en ĉiujn direktojn trans la vasta haveno diligente rapidas ĉiuspecaj ŝipoj, vaporpramegoj, boatoj, blekante kaj fajfante en senlaca kaj nepriskribebla okupateco.

Bedaŭrinde tiun vivoplenan scenon ni devis baldaŭ forlasi, por preni nian lokon en unu el la longaj vicoj da personoj, kiuj atendas malsupre en la mangohalo ĝis la emigraciaj oficistoj kontrolos siajn vojaĝpaperojn. La afero estas io pli, ol simpla formalajo. Ni jam estis skribintaj sur nia bilet-dokumento respondeojn al multafera demandaro : kio estas nia profesio, ĉu ni estas anarhistoj, bigamistoj, kio estas nia celo en Usono, kie kaj kiom da tempo ni restos, k.t.p., kaj nun ni devis buše respondi diversajn pluajn demandojn. Laŭ malbona ŝanco nia oficisto (por pasageroj, kies nomoj komenciĝis kun la litero M) ŝajnis esti la plej malrapida el ĉiuj. Ni do devis longaĉe atendi, kaj el la interesaj epizodoj de la endokiĝo spertas nur la sonojn kaj kriojn, kiuj eniris tra la fenestro. Mi ja domagis la tempon, kaj mi demandas al mi, ĉu la registaro ne povus — eble pere de la ĉefservisto sur la ŝipo — pli oportune kaj rapide arangi tiun ceremonion.

Fine estis finita, kaj ni estis liberaj el ŝipiĝi. Sur la kajo nin atendis kelke da Novjorkaj gesamideanoj, inter aliaj S-ro Silbernik, bofrato de la Majstro. Per ilia afabla helpo plisimpligis por la ne-angloj la pakajdeklaro ĉe la dogano, kiu ja, laŭ tio, kion ni vidis apude, por multe da multon aĉetintaj Amerikaninoj devas esti afero sufice elspezia!

La plejmulto de la Eŭropaj samideanoj sin instalis, por sia restado en Novjorko, en la Herald-square Hotelo, centre lokita apud la fama Broadway. Ĉar tie logis ankaŭ D-ro kaj S-ro Zamenhof, la hotelo servis kiel oportuna kunvenejo por babilado kaj deirejo por vizitoj tra la urbo. Por ni Eŭropanoj la Usona hotela vivo estis multmaniere nova : La granda enireja halo kun la ledaj braksegoj, kie ĉiuhere sidas interparolante aŭ fumante la gasto, da vico da ĉiampretagaj negroj, konstante diskurante por tiu aŭ alia servo, la oftaj elvokoj de la telefonistino ĉe sia komutatoro speciale instalita en la halo mem, la gazet-kaj pošt-kart-vendejo — ĉio ŝajnis interesa. Kiel fidelaj malnovmondanoj, kelkaj el ni logis "laŭ la Eŭropa metodo," t.e. ni mangis laŭ nia plaĉo ekster la hotelo. Por aparta ĉambro sola oni devis pagi du aŭ pli dolarojn por tago, aŭ du povis dividii ĉambron por kuna pago de tri aŭ pli dolaroj. Por la mangoj, oni povis viziti la tre oportunajn kaj bonege organizitajn restoraciojn "Child," iom similaj al tiuj de "Lyons" en Londono, sed pli rapidemaj kaj vivoplenaj, laŭ la intensa Novjorka maniero, kaj — ŝajnis al mi — pli vigle kaj facile funkciantaj.

Pri ĉio, kion mi vidis, mi ne havas lokon ĉi tie paroli, sed devos kontentiĝi je prezento de nur kelkaj impresoj. Kio min unue frapis kaj agrable, tio estis la varmeco de la vetero, kaj la ĉiea klareco de la atmosfero, kiu devenas, mi supozas, de la fakteto, ke oni en Novjorko hejas per malmola karbo. Kiam do mi ian matenon pagis unu dolaron kaj supreniris

per "ekspreza" elevatoro (oni ja havis, krom tiuj, "lokajn" kaj "mezajn") ĝis la pinto de la 48-etaĝa "Singer" turego, mi povis ĝui mirindan elvidon sur la tutu vasta urbo sternita kiel mapo antaŭ miaj okuloj. Tiu konstruajego estas alta pli ol 580 futojn (pli ol la duono de la Eiffel-turo en Parizo), kaj staras en la suda kvartalo, ĉirkaŭate de pluaj gigantoj de dudek ĝis trid k etagaj, ĉiu ĝi same pelataj ĉielo de la mallarĝeco de la insulo kaj la pli kaj pli kreskanta komercista bezono pri centre lokitaj oficejoj, kaj en la nordo de la urbo elstaras la "Metropolitan Building," pli alta eĉ ol la "Singer." Rigardante el tiu altega observejo, sur tiun vastan labirinton de intensa kaj konstanta laborado, aŭdante la agrable miksitaj sonaron de ĉiuspecaj okupoj, kiu ĉiuflanke el ĝi levigas, spirante la tiel frēsan tiean aeron, kaj vidante la senĉese movigantan procesion de hometoj, kiuj kvazaŭ formikoj tie malsupre svarmas, svarmas, svarmas kun mil diversaj celoj latu la longaj rektaj stratoj, oni ne povas ne eksenti ian strangan entuziasmon kaj fierecon pri la mirindaj faroj, kiujn tie plenumis la progreso de l' homaro. Mi momente forgesis la multajn sociajn malbonojn, kiun kaŭsis tiu bela eksterajo : mi vidis nur la alrapidantajn ŝipegojn, kiuj portas vendotojn el ĉiu parto de la tero, la imponantajn magazenojn, kie paradas kun ĉia cirkonstanco de iukso la plej elspezema riĉularo en la mondo, la mirinde organizitajn oficejojn de mond famaj firmoj, kaj la tuto briliante antaŭ mia vigligita fantazio kiel mirinda simbolego de homa kapableco...

#### VESPERA Novjorko.

Vespere, kiam mi vagadis en la ĉiama fluo de l' promenantoj sur Broadway, tiu sama sento estis ankoraŭ forta en mi. Kaj ĉio — la generala gajeco kaj "vivemeco," la brilantaj fenestroj de l' butikoj, la strata bruado, la lumoj, la sangigantaj elektraj anoncoj — helpis ankoraŭ tiun humoron plifortigi. Unu luman "afišon" mi vidis, kiu ja estis ĉefverko en tiu arto. Klare videbla de Broadway, ĝi diverskolore figuris roman caron tiratan de du galopantaj ĉevaloj, kiun sekvis sur la areno dua ĉaro. En la fono lerte aranĝita lumaro aspektis kvazaŭ amfiteatro kun la alrigardanta popolamaso. La tuto estis farita el multege da elektraj globetoj. Oni vidis eĉ la polvon sprucigatan, kiam la lumaj hufoj de l' ĉevaloj kvazaŭ frapis la teron. Kaj ĉiam, revenante al la hotelo, oni vidis tiujn senĉese galopantajn parojn, denovan emblemon de l' homa antaŭenirado...

Tiuj elektraj anoncoj estas la plej karakteriza trajto de vespera Novjorko, kiu ja pro tio pli meritas la nomon "lumurbo," ol Parizo mem. Por pli bone ĝui la spektaklon, mi supreniris la dekkelke da etagoj ĝis la tegmenta ĝardeno de la luksa Astor Hotelo. Tie, promenante inter la beletaj florbedoj kaj la murmuranta platiado de diverslumigitaj fontanoj kaj akvogrotoj, aŭskultante la orkestron, kiu en nesto de palmoj ludas al ĝojanta festenanaro, oni sin kredus en ia sepalaco el la Mil kaj Unu Noktoj. La tutu vastan masivon de la hotelo borderas teraso, el kiu kvazaŭ de abrupta krutaĵo oni povas malsupren kaj ĉirkaŭen rigardi al la unika pejzago, kiun formas la apudaj domegoj, kvazaŭ gigantaj nigraj rokoj banate en lumo. De apuda ŝtala skeleto de ia konstruata nova hotelo venadas la diligenta bruado de marteloj kaj leviloj. Kaj, post tiu angulo de masonaĵo, se ni povus travidi, seplase galopadas tiuj lumaj ĉevaloj de l' progreso...

Jaŭdon matenon, reveninte de la vizito al la Singer turego, mi trovis D-ron kaj S-inon Zamenhof, kun D-roj Arnhold kaj Mybs kaj S-ro Winkelmann, instalatajn en granda aŭtomobilo, kiun afable prunte-donis Kapitano Emerson, amiko de Kolonelo Pollen. Laŭ bonſanco, loko estas farebla apud la "Sofero," kaj baldaŭ ni gaje glijas la Fifth Avenue, preter la kvazat-palacoj, kiujn la milionuloj en elspezema konkuro de tie

por si konstruigis. Ni veturnis tra la fama Centra Parko, vasta kaj bele aranĝita promenejo de ĝardenoj kaj arbaretaj, kie antaŭe ekzistis nur senkultura kaj malĉarma deſutejo por cindraĵoj kaj forĝetaĵoj.

De tie ni eliris al Riverside, la bela promenejo, kiu iras latu la bordoj de la Hudson. Poste ni vizitis la faman maŭzoleon de Generalo Grant, tre simila latu arango, al la tombejo de Napoleono en Les Invalides, Parizo. Ĝi estas impresa lokita sur altaĵeto apud la larga rivero, kies kontraŭa bordo, kun siaj arbokovritaj krutaĵoj, prezentas pejzaĝon ne malpli belan ol tiu de multaj admirataj lokoj sur la Rhein. Nia kompanieto ankaŭ havis la plezuron, alkondukite de beleta privata servo ſipeto, viziti la vaporjaĥton "Margaret" de Kapitano Emerson. "Si" jam vojaĝis multajn milojn da mejloj — estis sur ŝi en Singapore lastan jaron, ke Kolonelo Pollen konatiĝis kun ŝia posedanto — kaj efektive tre agrable devas esti, jugante latu la komforta kaj praktika instalaĵo, fari vojaĝon en tia jaĥto. Ĉe tiu viziteto montriĝis iom da lingva malfacileco, ĉar nia gastiganto, parolante nur sian gepatran lingvon, devis kompreñi sin per tradukigo. Sed estis bona okazo por D-ro Mybs, diligente ekzercadi sin pri la angla lingvo! Sidante sur la ferdeko de la jaĥto, oni havis pluan impreson pri la riĉeco de Novjorko, kiam oni rigardis longan serion da multetaĝaj apartamentejoj, kies belstilaj fasadoj ornamas la tutan riverbordon. Ĉambraro en tiuj luksulejoj estas apenaŭ luebla po malpli ol 1,000 dolaroj por jaro.

Sed alian aspekton de Novjorko mi vidis, kiam kun la "Gemajstroj," latu afabla invito de S-ro Silbernik, mi travizitis en "taksi" la orientan kvartalon, la "malriĉulejon" kie logas la fremdula parto de la urbego. Kia svarmejo! Kiel pitoreskaj estas la stratoj kun siaj budaj vendejoj, siaj butikoj kun la kuriozaj surskriboj en hebrea lingvo, la intimaj familiaj grupoj ĉe la fenestroj, la infanoj kiuj en ĉiaj gradoj de vesta negligo ludas kaj baraktas sur la stratoj! Oni kredus esti en ia urbo en la varma Sudeŭropo. La popolamaso estis tiel densa, ke, malgraŭ la ĉiumomenta blekado de la avertilo, la aŭtomobilo nepre devis veturi latu piedira malrapideco. Kaj la vojoj — en kia malbona stato ili estis! Ciun duan aŭ trian metron nia veturnilo profundigis duonfuton en ia truo, aŭ devis eviti ian amason da rubaĵoj. Kaj efektive, la duono de la vojoj en Novjorko ŝajnis obstrukcataj de riparaj laboroj. Sed malgraŭ la generala nelukseco, la bonhumoraj vizagoj de la popolanoj montris, ke ne mankas tie gajeco kaj vivo ĝojo, kaj la duonnudaj bubetoj sur la strato ĉirkaŭsalutatis kaj petoladis en plej bela feliĉegeco. Vera paradizo por artisto!...

Poste, trans- kaj reen-veturinte sur la grandega Williamsburgh pendponto, ni iris al la fama hebrea kafejo "Lorbeer" por vespermangi en tute deca konformeco kun lokaj kutimoj kaj kondiĉoj.

Mia vespero — efektiva kaleidoskopo da impresoj! — finiĝis per vizito al Coney Island, la granda foiro kaj ludejo, kie Novjorko sin distradas dum la varma duono de la jaro. S-ro Stock, Novjorka samideano, afable min akompanis kaj montris la ĉefajn vidindajojn. Estis ja vidinda kiel karakteriza fazo de la urba vivo, sed mi ne povis ne senti iom da bedaŭro, ke urbo tiel imponanta kiel Novjorko, ne povis krei por siaj popolanoj distrajaron malpli krudan, pli klerigan, ol tiuj, kiujn ni vidis en tiu vasta brila amuzejo... Estis preskaŭ la unua matene kiam mi revenis Novjorkon kun duone dormanta plenvagono da amuzigintoj, en la elektra ekspresso.

#### INDIVIDUALISMO AŬ LA SOCIO?

El ĉio ĉi tio, kaj el tio, kion mi vidis en la Orienta Kvartalo kaj aliloke, kreskis pensaro, kiu multe modifis minian unuan impreson pri la brilanta progresemeco de Novjorko. Mi komencis demandi al mi, ĉu tiu mirinda grandeco de rezultatoj, kiun oni ĉiuflanke

vidas, estas efektive tiel eminenta kaj prigojinda, kiel ĝi ŝajnas? Ke ekzistas en la Usona vivado ia potenca fortego, kiu nehaltigeble instigas kaj pušadas la homojn al senĉesa penado kaj atingado, neniu ja povas dubi; sed ĉu tiu fortego estas koncie direktata kaj uzata al altaj celoj kaj por la komuna bono? Tie, ŝajnas al mi, estas la malforta punkto de la Usona socio, kia mi ĝin ekvidis; la ioma manko de komuna agado por komuna socia idealo, kvazaŭ la "civitana" sento, malgraŭ la demokrateco de la Usonanoj, iel ne estas ankoraŭ forta kaj mem-konscia. Ĉie oni vidas mirindajojn de arhitekturo, de organizado; sed la plejmulto estas por la profito de iu areto da individuoj, por la privata guo de iu aparta kompanio aŭ asocio. La konstruajegoj, kiujn tiel mirigas la vizitanton, ne estas la publikaj urbaj administraciejoj, sed nur la produktego de ia privata komerca aŭ industria iniciativo. Ŝajnas al mi, ke oni ĉi tie ne sufie respektas la civiton kiel la komunan templon de la socio; ja la ofta uzado de la vorto "graft" montras, ke multaj opinias la civiton io ekspluatinda. La plejmulto estas tiel okupegata pri siaj propraj personaj aferoj, ke li ne havas tempon por sin okupi pri komunaj publikaj celoj. En la ĉiutagaj jurnaloj oni aŭdas la saman noton. Cio estas persona, ĉiam la individuo adorata kaj kreskeganta lati sia propra dolĉa volo. Tamen, tio estas eble nur trajto neevitebla ĉe la junaga vivado de socio sensimile miksevena kaj heterogena, kiu iam, kiam ĝiaj diversaj elementoj interasimiligos, preskaŭ certe farigos popolego tia, kian la mondo ankoraŭ ne vidis. Al la venonta ĝango montras jam la kreskanta geno kaj nekontenteco, kiun nuntempe eksentas la popolo, kontraŭ tiuj akaparemaj floreoj de individua libereco: la trustoj. Kaj la Centra Parko kaj diversaj grandiozaj muzeoj kaj kolegioj atestas, ke publika konsento ne tute mankas. Dume, la torĉon portanta statuego en la haveno ŝajnas al mi simboli, almenaŭ en Novjorko, ne tiom justan liberecon, kiom individualismon *in excelsis*.

Sed mi tro filozofias! Restas ankoraŭ priskribita la Kongreso. Pardonu, kara legantaro, mian eble tro longan kaj sekan sociologian ekskurson. Morgaŭ mi vin kondukos al Washington... Eble tie, en ĉefurbo, kiun naskis kaj kreskigis ne aparta individualismo, sed ŝtatara kunlaboremeco, ni ricevos impresojn de alia speco. Sed antaŭ ol diri adiaŭ al Novjorko, ni ne forgesu danki tutkore la samideanojn, S-rojn Silbernik, Stock, Klein, Reich, Kirkham kaj aliajn, kiuj tiel afable bonvenigis kaj helpis nin dum nia tre agrabla restado en la urbo.

## ZAMENHOF ALVENAS.

Varmega Akcepto al la Eltrovinto  
de Esperanto.

BONVENON AL "KONGRESURBO."

Agrable Impresita de la Chiea Libereco  
kaj Vigleco Usona.

INTENSA VIVO LIN MIRIGAS.

Esperas Multon de la Disvastighado de "la  
Kara Lingvo" en Nia Vastega Lando.

## ARLINGTON HOTEL, WASHINGTON,

Dimanĉon, la 14an de Augusto.

Tiel, per kolontitolaro karakterize Usona, la agema *Washington Evening Star* anoncis en Esperanto la alvenon hieraŭ de D-ro Zamenhof kaj nia kompanieto el Novjorko. La unua ĉapitro de la Kongreso malfermiĝis.

Elvagoniginte en la tre bela stacidomo en Washington, post tre agrabla veterado tra interesa arborica pejzago kaj la bordo de Chesapeake Bay, ni trovis grandan amason kunvenintan por krii bonvenon al la Majstro kaj la Eŭropaj delegitoj. Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto! tuj laŭtigis je ĉiu flanko, la kongresanoj (kun la helpo de la Esperantistaj policanoj) sin arangis por lasi inter si irejon, kaj tra tiu kvazaŭ triumfa vojo paſis, modestulo kiel ĉiam, la Majstro, inter la ama kaj entuziasma aklamado de samideanoj el ĉiuj partoj de la mondo. Lin akceptis kaj eskortis D-ro Yemans, kiel vicprezidanto de la Usona Asocio Esperantista, Kapitano Perogordo el Hispanujo, por la vicprezidinto de la Kvina Kongreso, D-ro Mybs el Hamburg, efektiva prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, S-ro Chavet el Parizo, sekretario de la Centra Oficejo, S-ro Edwin Reed, sekretario de la Sesa Kongreso, kaj D-rino Ivy Kellerman-Reed, el la Organiza Komitato.

Veturigate per nerekta vojo al la "Akceptejo" en la Arlington Hotelo, la alvenintoj povis ekvidi, kiel bela estas la ĉefurbo. La fama Kapitolo, la granda Trezorejo, la multaj grandiozaj muzeoj kaj oficejoj, estas efektive publikaj monumentoj tute indaj je la granda lando, kiujn ili reprezentas.

La Akceptejo estas tre oportune lokita en la Arlington Hotelo, malnova kaj iom post iom kreskinta konstruajego apud unu el la tre agrabla publikaj garden-parkoj, kiuj abundas en Washington. Multaj el la kongresanoj — inter ili D-ro kaj S-ro Zamenhof kaj la pligranda parto de la alilandaj samideanoj — loĝas en la hotelo, kiu pro sia granda enira halo kaj siaj diversaj akcepto-ĉambroj tute bone taŭgas por centra kunvenejo. Eĉ la Agadaj Kunsidoj de la Kongreso povos okazi en vasta salonego, kiu troviĝas en la posta parto. Kaj videb-e — bona punkto — ne mankos lokoj por interbabilado!

Sabatan vesperon, kiam la vojagintoj iom refreſigis post sia longa veterado, oni dediĉis al nesolena akcepto, kiam ĉiu kongresano povis premi la manon al D-ro Zamenhof, kaj libere interkonatigi kun la ceteraj samideanoj. Orkestro konsistanta el membroj de la Ŝtata Marista Regimento bele ludis dum la vespero, interalie la Esperantan himnon, en kiu kunkantis plej fervore ĉiu ĉeestanto. Entreprenema jurnalisto intervuis la Majstron, kies impresoj pri Ameriko poste aperis jene en la hodiaŭa eldono de la *Star*:

"Tio, kio plej multe min impresis, tuj kiam mi metis piedon sur la teron en la nova mondo, estis la sento de libereco, kiu kvazaŭ vibras en la aero usona, kaj aperas videble sur preskaŭ ĉiu vizago, kiun oni renkontas sur la stratoj. Ankatau min multe frapis la viva nerva energio, kiu evidente instigas ĉiujn amerik-anon. Estas por mi kvazaŭ nova lando, al kiu mi ankoraŭ ne tute alkutimiĝis. Novjorko estas urbeglo tiel kolosa, tiel dinama, tiel tute malsimila je kiu ajn eŭropa urbo, ke ĝi inspiras ĉe mi nevenkeblan miron.\* Kvankam la Esperantista movado en Usono estas ankoraŭ tute juna, ĝi jam montras grandan vivopovon,

\* Kio transformigis en la apuda angla kolono en la jenan "diregon": "New York completely dazzles him" continued Dr. Yemans (kiu tradukis). "He says that it is so colossal, so splendid in what might be termed a semi-barbaric manner, so vibrant with energy, that it literally stunned him. He wishes me to repeat that he is amazed, startled, astonished, and everything else that expresses the superlative degree of wonderment!"

kaj promesas vastan progresadon. Eble la plej grava afero por la disvastiĝado de nia afero estas la kuragigo kaj kora kunhelpado de la tutmonda gazetaro, kaj poste la simpatio kaj aprobo de ĉiuj lernejoj kaj kolegioj. Ke nia lingvo Esperanto tiom penetru en la lernejojn de Usono, kiom ĝi jam pli kaj pli penetras en multajn lernejojn en Eŭropo, tio estas la plej kara revo de nia tuta Esperantistaro."

#### ESPERANTA DISERVO.

Hodiaŭ matene okazis nia ĉiu-jara Esperanta Diservo, ĉi tiun fojon en la Episkopaliana Pregejo de S. Paŭlo. D-ro Zamenhof ĉeestis kun multaj el la kongresanoj, ankaŭ partoprenis multaj Washington'anoj. Pastro Paul F. Hoffmann, samideano el Baltimore, kondukis la solenon, kaj Pastro James E. Smiley el Annapolis faris belan esperantan predikon. Loka gehoristaro bone plenumis en Esperanto la muzikan parton de la servo, kiun faciligis por la ne-Esperantistoj bonguste presita himnaro kaj predikaro en angla kaj esperanta lingvoj.

La posttagmezo estis oportuna tempo por traviziti la urbon. Unu el la diversaj turistaj aŭtomobilaj kompanioj jam presigis esperantan gvidcirkuleron, kaj multe da Esperantistoj plenigis la grandajn ĉarojn, speciale al ili rezervotajn dum la tuta semajno. Kun ĉiu aro veturis Esperanton lerninta gvidisto, kiu pribilexis plej lerte per megafono ĉiun interesajon. Dank' al tiuj ĉaroj, kaj la tre bele farita kaj presita Kongreslibro (suldita precipe al la klopodoj de samideano Schubert, la U.E.A. delegito) la kongresanaro povos inspekti laŭ sia plaĉo la multe da rimarkindaj vidindaĵoj, kiuj faras Washington unu el la plej belaj urboj de la mondo.

Ĉi tiun vesperon la ĉefa okazo estis improvizita konekto en la salonego de la hotelo. Kiel multaj Esperantistaj improvizajoj, ĝi bonege sukcesis, kaj jam en la komenco donis al la Kongreso tiun kamaradecon kaj familia-rondecon, kiu ĝin karakterizis dum ĉiu cetera kunveno. Tie oni havis la plezuron audi inter aliaj S-ron Harris, kiu kantis la belan "Mi aŭdas vin" komponitan de si mem, kaj S-inon Williams, kiu ricevis veran ovacion por sia ĉarma prezento de "la juvela kanto" el Faust.

#### LA MALFERMA KUNSIDO.

La Sesa Mondkongreso officiale malfermis lunden la 15an, matene je la deka, en la granda aŭditorio de la Arlington Hotelo. La salonego, bele ornamita per Esperantistaj flagoj, estis tiel plena, ke multaj samideanoj devis stari. Inter la delegitoj sur la estrado oni povis rimarki la pitoreskan kostumon de du hinoj.

La kunsidon formale malfermis Kapitano Perogordo el Madrid, anstataŭ la prezidinto de la Kvina Kongreso, S-ro Pujula, kiu ne povis veni Amerikon. Li proponas al la Kongreso, en la nomo de la K.K.K., la jenan estraron, kiun on aklame akceptas: Prezidanto, John Barrett, prezidanto de la Esperantista Asocio de Nordameriko kaj Estro de la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj; vicprezidantoj, D-ro Yemans kaj D-rino Ivy Kellerman-Reed; sekretarioj, Gabriel Chavet, sekretario de la K.K.K., kaj Edwin C. Reed, sekretario de la Loka Organiza Komitato. Li ankaŭ anoncas la vicprezidantojn, kiujn rajtas ĉiu kongresfarinta nacio: Britujo, W. W. Mann; Francujo, Rollet de l'Isle; Germanujo, D-ro Mybs; kaj Hispanujo, Kapitano Perogordo.

Tiam levigis D-ro Hale, kaj en la nomo de S-ro Barrett — kiu bedaŭrinde pro malsano ne povis ĉeesti — diris al la kongresanoj kelkajn vortojn de kora bonveno, kaj petis, ke D-ro Yemans bonvolu prezidi la kunvenojn. D-ro Yemans, okupinte la segon de honoro, tuj legis pluan komunikon de S-ro Barrett, kiu telegrame esprimas persone sian bedaŭron, ke pro la postuloj de sia kuracado li ne povas partopreni, kaj invitas la

ĉeestantan samideanaron al solena akcepto merkredon vespere en la salonego de la Internacia Oficejo, kiam li povos mem saluti ilin. Li diras, ke li estas profunde interesata pri la Kongreso kaj fidas, ke ĝi havos tre grandan influon, disvastiĝante la uzadon de Esperanto tra Usono kaj tra la mondo.

Poste parolis D-ro Mybs, ano de la K.K.K. kaj vicprezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio. Li esprimas la komunan bedaŭron pro la foresto de Generalo Sébert kaj Rektoro Boirac, kaj faras proponon — aklame akceptitan — ke oni sendu al ili telegramojn de danko pri la grandegaj servoj, kiujn ili dum la pasinta jaro faris al Esperanto per sia sindonema laboro. Li prezentos en posta kunsido la raportojn, kiujn tiuj du sinjoroj komisiis al li legi en ilia nomo.

#### DEKTRI REGISTARAJ REPREZENTANTOJ.

S-ro Chavet havas la parolon. Li diras, ke ĉi tiu Kongreso, laŭ la vidpunkto de *oficiala* reprezentado, estas la plej grava, kiun la Esperantistoj ĝis nun havis. Dekdu *registroj* sendis specialan delegiton. Ili estas: BRAZILUJO, EKVATORIO, GVATEMALA, HINUJO, HIS-PANUJO, RUSUJO, HONDURAS, KOSTA RIKO, MEKSIKUJO, PERSUJO, URUGVAJO, USONO (tri reprezentantoj: D-ro Yemans kaj S-ro Charles Stewart por la tera kaj mara militistaroj, kaj S-ro Wolcott por la departamento de internaj aferoj, kiu petis S-ron Reed verki specialan raporton por ĝia ĉiu-jara raporto). Ankaŭ la USONAJ ŜATOJ CAROLINA, LOUISIANA kaj OREGON estis reprezentitaj de S-roj V. C. Dibble, J. G. Haupt kaj J. C. Cooper respektive. Poste venis al Ameriko ankaŭ plua delegito registara, sed tro malfrue por partopreni la kunsidojn — el JAPANUJO. Entute do estis reprezentitaj 13 registroj, kio klare montras, ke Esperanto estas jam akceptata ĉie kiel nešancelebla kaj utiliginda vivanta fakteto. La registroj ne kutimas, sin okupi pri himeroj!

Speciale kurioza por la aŭskultantaro estis la parolado, kiun faris hinalingve ambasadoreja sekretario Lu Ping Tien, tradukita esperanten de S-ro Osmeña el Filipinaj Insuloj. Li diris, ke li certe faros tre favoran raporton al sia registro, kaj esperas, ke tiu decidos baldaŭ enkonduki la lingvon en la lernejojn de Hinujo. S-ro Mello Souza, parolante en flua Esperanto por la Brazila Registro, diris, ke tiu jam ekutiligis Esperanton, metante en la publikaj telefonoj kaj telegrafejoj afišojn en Esperanto. Kapitano Perogordo el Madrid faris la laŭte aplaŭditan sciigon, ke la Reĝo Alfonso XIII. per persona letero rekomendis la lingvon al sia Ministro de Internaj Aferoj. Kapitano Postnikov, reprezentanto de la rusa Ministrejo de Komerco kaj Industrio, gratulis la Esperantistaron pri tio, ke ili altiris al sia afero la atenton de tiom da registroj, kiujn la forteco kaj seriozeco de nia movado nepre baldaŭ konvinkos.

S-ro Chavet legas la multajn telegramojn kaj leterojn, salute senditajn al la Kongreso el ĉiuj partoj de la mondo. Tiajn sendis la U.E.A. Kongreso en Augsburg, S-ro Edwards en Gibraltar, la Terruen Grupo en Hispanujo, Esp. Soc. en Simbirsk, *Internacia Scienca Revuo* en Kotschzenbroda, S-ro Moscheles kaj la Londona Klubo, Bombay Esp. Grupo, Bohema Unio en Praha, Ciostudenta Asocio, S-roj Michaux, Privat, k.t.p.

Poste propono de D-ro Yemans, ke la Kongreso sendu salutan telegramon al la Prezidanto de Usono, S-ro Taft, estis aklame akceptita, kaj tiam la Majstro levigis por fari sian tradician ĉiu-jaran paroladon. Kelkminuta ovacio lin salutis. Lia trafa parolado, kiun ni presas alioke en ĉi tiu numero, daŭris ĝis la meztaga horo, kaj estis aŭskultata kun plej granda atento kaj intereso. Ofta aplaŭdado montris, ke la ĉeestantaro plene koncentras liajn tre pravajn dirojn. Kunkantado de "La E-tero," kondukata sur la piano de Prof. Querino de

Oliveira el Brazilujo, finis la matenan parton de la kunsido.

#### SALUTOJ DE L' NACIAJ DELEGITOJ.

La posttagmezon oni komencis per sendo de saluta telegramo al Eksprezidanto Roosevelt, laŭ propono de D-ro Yemans, kiu diris, ke lia eminenta amiko Jus persone sendis al li leteron, per kiu li certigis sian plenan aprobon kaj simption pri nia afero. La tutan ceteran kunsidon okupis la paroladoj de la diverslandaj Esperantistaj delegitoj. Dudek-tri nacioj estis reprezentitaj : AÜSTRIA (S-ro Gottschall), KROATUJO (Plesche), BRITUJO (R. Sharpe), SKOTUJO (Warden), IRLANDO (D-ro Pollen), KIMRUJO (S.-ino Theodore), FRANCUJO (Cotton), GERMANUJO (D-ro Arnhold kaj S.-ino Hankel), GIBRALTAR (Pollen), HISPAÑUJO (Kap. Perogordo — raportita en iu gazeto kiel Pierre Gordon!), ITALUJO (Chavet), MALTA (D-ro Yemans), RUSUJO (Kap. Postnikov), LITOVUJO (Tabenski), POLUJO (S.-ino Essigmann), SVISUJO (Forestier), HINDUJO (Tedmann), SUDAFRIKO (Carter), BRAZILUJO (Querino de Oliveira), KANADO (Geldert), MEKSIKO (Vualbos), PORTO RICO (Negron), PERUO (Reed), URUGVAJO (Muñoz), USONO (Spillmann), FILIPINAJ INSULOJ (Osmeña), kaj AÜSTRALIO ORIENTA kaj OKCIDENTA (Fryer kaj Skurrie).

Ĉiu delegito raportis tre kontentigan progresadon de Esperanto en sia lando, kaj kelkaj el la paroladoj estis agradable amuzaj. S-ro SHARPE, parolante por Britujo, aldonis ion por Torquay, kies unikeco konsistas en tio, ke tie troviĝas 120 Esperantistoj kiuj ĉiuj estas Esperantistinoj, kiuj ne nur sendis koregan saluton al la Majstro, sed petis, ke li ankaŭ transdonu al li por ĉiuj el ili varman kison. (Por spari la tempon, oni akceptis la kisaron kiel donitan.) D-ro POLLON, salutinte por la "Verdega Insulo," demandis, kie estus Ameriko sen la Irlandanoj, kaj ricevis laŭtan aplaŭdon kiel respondon. D-ro ARNHOLD faris tre belan paroladon en la nomo de Germanujo. Li parolis pri la grandaj sukcesoj lastjaraj de Esperanto en tiu lando, pri la 230 grupoj nun tie ekzistantaj, kaj sciigis, ke la Saksa Registaro komisiis lin, fari specialan raporton post lia reveno hejmen. Li finis citante la belan parolon skribitan en oraj letero sur la granda ŝipo "George Washington," kiu portis la Majstron al Ameriko : Ĉiam observu honestecon kaj justecon kontraŭ ĉiuj nacioj, ĉiam vivu en harmonio kaj paco. Kio pli taŭga por tio, ol Esperanto? Kap. POSTNIKOV ankaŭ trafe parolis pri la utilo, kiun li spertis el Esperanto. Antaŭ multe de jaroj, ankoraŭ ne-Esperantisto, li vizitis San Franciskon, provizite per kelkete da nesufiĉaj anglaj frazoj. Nun, Esperantisto, li denove venas, kaj vidas tiun saman Amerikon, tiujn samajn Amerikanojn. Antaŭe ili estis por li nur objektoj; nun ili estas *homoj!* S-ro REICH (Novjorko) parolis por "la multaj milionoj, kiuj uzas la hebreen lingvon, kiuj eble pli ol ĉiu alia popolo suferas pro la monda diverslingveco kaj diversreligieco, sed al kiuj en Esperantujo oni etendas sinceran manon de frateco kaj amikeco.

Prof. SPILLMANN vigle parolis en la nomo de Usono. En lia lando, li diras, oni ne timas novajojn, speciale kiam novaĵo estas bona, kaj li estas certa, ke Esperanto estas bona! Usono ĉiam estis kaj estos la lando de la Espero. Esperanto rapide disvastiĝas ĉi tie, kaj li ne dubas, ke tre baldaŭ, rezulte de la Sesa Kongreso, Usono estos la teatro de tre grava agado por nia lingvo, kies praktikeco hodiaŭ plene montrigis. En Usono Esperanto vivadas kaj vivados, kaj tiuj standardoj (li montras la usonan kaj Esperantan flagojn fiksitan super la estrado) baldaŭ unuigos!

Post la fermo de la oficiala parto de la kunsido parolis diversaj samideanoj reprezentante kelkajn specialistajn asociojn : Kap. Postnikov por la Universala Ligo; S-ro Albert Warrington por la Teozofia Societo, kiu

diras, ke Teozofio, starante *kun* Esperantismo sur la komuna fundamento de universala frateco, nepre laboros por nia lingvo; kaj D-ro Farred, perso el Ispahan, kiu portis specialan fratan saluton el Baha Ullah mem, la respektigata estro de la vasta Bahaja movado, kiu unuigas nun en Persujo kaj Hindujo, en amika kunlaborado por la bono, multajn milojn da Mohamedanoj, Hindoj, Parsioj, Judoj kaj Kristanoj.

Je la kvina okazis la oficiala grupfotografigo, sur la granda ŝuparo de la Registara Trezorejo, kiam la kongresanaro gajhumore sin submetis al la pafado de vigla bandeto de fotografistoj, profesiaj kaj ne-profesiaj. Vespere, post la longa malferma kunkveno, ĉiu samideano estis preta por la anoncita "lunluma ekskurso" sur la Potomac, la frankvila kaj ĉarma rivero, kiu beligas la regionon ĉirkaŭ Washington. Feliĉe la malbona vetero, kiu unue minacis, poste cedis al la sorĉo de nia lingvo, kaj la Esperantistaro povis ĝui en plena gojo la kelkmejan veturnon sur la vaporŝipo "St. John," preskaŭ kvar horojn da plej agrabla ripozo.

#### KUNSIDO DE LA LINGVA KOMITATO.

Mardo esis difinita al diversaj specialistaj kunkvenoj. Ili okazis en la oportunaj ĉambroj, kiujn afable metis je la dispono de la Kongreso la George Washington Universitato. El la ĉefa estis tiu de la LINGVA KOMITATO, la plena protokolo de kies kunsido aperas en la *Oficiala Gazeto*. Ĉi tie ni povas nur citi resume kelkajn el la plej komuninteresaj punktoj.

D-ro Mybs, kiu prezidis, legis la interesan raporton de S-ro Boirac pri la laboroj, kiujn faris dum la pasinta jaro la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio. Tiu raporto, poste prezentita publike al la kongreso, estas ja bona respondo al tiuj senpacientuloj, kiuj tute senbase plendas ke la L.K. nenion faras. Kiel prave diras S-ro Boirac, ĝi plene montras, ke la L.K. laboradas laŭ la ĝusta vojo por la vivado de nia lingvo, kaj ke ĝi merititas konservi la konfidon de la Esperantistoj. Jen la fakoj en ĝi traktitaj : Subkomitato pri la Prepraj Nomoj; Komisiono pri Tehnika Vortaro; Komisiono pri Gramatiko; Komisiono pri Komuna Vortaro; Studkomisiono pri Ĉiulanda Esperanta Verkaro; Projekto de Regularo pri Kronado de Verkoj; Oficiala Organo; Komisiono pri Internaj Aferoj.

S-ro Rollet de l'Isle ankaŭ legis tre interesan raporton pri la laboroj de la komisiono de la Scienca Asocio pri la Tehnika Vortaro. Rilate al diskuteto naskiginta el tiu raporto, pri la dezirindeco de tio, ke vortaraj komisionoj havu ĉiam kiel eble plej diverslingvan konsiston, D-ro Zamenhof rimarkigis, ke estas ĉiam tre utile, havi slavojn en lingvaj studaj komisioj, ĉar la slavo staras iom flanke de la grandaj lingvoj, kaj povas plej bone kontroli la gradon de internacieco de iu radiko. Tre ofte oni en lingvaj laboroj oni akceptas vortojn aprobitajn de la plimulto, sed tamen ne bonaj, ĉar la vortoj ne estas kontrolitaj de slavoj.

Rilate al la propono de S.-ino Haskel, pri sintakso de gramatiko de Esperanto, pli detaile ol la "Fundamento," D-ro Zamenhof opinis, ke ni ne devas tro frue enkateni nian lingvon; ke afero, kiu hodiaŭ ŝajnas al ni bona, povas morgaŭ ŝajni nebona; kaj ke sekve pli bone estas, ke ni restu sur la fundamento de niaj dekses reguloj, kaj lasu al la lingvo ian elastecon pri ceteraj punktoj. Povas ja trovi dubaj punktoj. Sed ju pli oni legas bonajn verkojn, des pli solvigas tiuj duboj.

El tiu demando pri "dubaj punktoj" levigis decido starigi, per kunlaborado de la diversaj kompetentaj naciaj Asocioj Esperantistaj, kvazaŭ oficialan demandaron, kiu la Majstro, laŭ unuanime esprimita deziro de la ĉeestantaj Lingva-Komitatoj, konsentis respondi — ne officiale, sed kiel gvidanto — en la pagoj de la *Oficiala Gazeto*. Certe la tuta Esperantistaro,

kiu multe bedaŭris la ĉesigon de la trafaj Zamenhofaj respondeoj en *La Revuo*, ĝoje salutos kaj kore dankas tiun decidon de la Doktoro, daŭrigi tiun utilan serion.

Poste, sekve de plua diskuto pri la neceseco de detala oficiala gramatiko, D-ro Zamenhof esprimis la opinion, ke "nebone estas verki gramatikojn ĉiam pli kaj pli dikaj, ĉar tiaj verkoj nur fortimigas la lernantojn. En la *Esperantisto* de la unuaj jaroj oni bone skribis Esperante, kaj tamen oni havis nur la dekses regulojn. Oni diras, ke Esperanto estas tre facila. Kiam nova varbito volas lerni la lingvon, li deziras aĉeti plej bonan libron, kaj oni donas al li la plej dikan. Li do opinias, ke la lingvo estas tiel same malsimpla, kiel la ceteraj. Ekzemple, en kelkaj gramatikej, anstataŭ simple montri la verbajn formojn *as*, *is*, *os*, tre klarajn, oni presas ĉiujn malsimplajn formojn, *mi estas estinta*, k.t.p., kaj la lernanto kredas, ke li devas ĉiujn parkere lerni. Li konsilas, ke la verkistoj de gramatikoj antaŭ ĉio represu la dekses regulojn, kaj diru, ke el tio konsistas la gramatiko. Poste ili aldonu komentariojn pli detalajn laŭ sia plaĉo, sed ili klare montru, ke la oficiala parto estas nur la dekses reguloj." Tiun deziron de la Majstro plene konsentis ĉiuj ĉeestantoj.

Alia interesa kunveno estis tiu de la Esperantistaj Jurnalistoj. Oni tie faris la unuajn pašojn al organizata interhelpado, per sistema intersangado de propagandaj artikoloj, k.t.p., inter la diversaj naciaj Esperantistaj gazetoj. Por faciligi tion, oni ekstarigis "Internacian Gazetistan Asocion," kiu havos du ĉefajn celojn: (1) utiligi la nacian gazetaron por Esperanto, kaj (2) utiligi Esperanton por la naciaj gazetaroj. Detalojn oni povas havi ĉe S-ro Sergius Winkelmann en Dresdeno.

Okazis ankaŭ kunvenoj de Juristoj, Kuracistoj, Fervojistoj, Ingénieroj, Elegistinoj, Katolika Unuiĝo, kaj Liberpensuloj.

#### AKCEPTOJ ĉE LA REGISTARO.

Postagmeze la plejmultaj el la vizitantoj partoprenis en ekskurso al la belaj Kaskadoj de la Potomac. Dume D-ro Zamenhof, la Estraro de la Kongreso, kelkaj la Esperantistaj registaraj reprezentantoj kaj la naciaj vic-prezidantoj faris oficialan rondviziton al la diversaj Ŝtataj Ministrejoj. Sub la vigla kondukado de D-ro Yemans, kiu persone konis multajn el la departementestroj, ni estis akceptataj de S-ro Hale, assistanta sekretario pri Eksteraj Aferoj, S-ro Oliver, unua assistanta sek. de Milito, la fama Generalo Wood, stabestro, S-roj Ireland kaj Winter, assistantoj de la Generala Milita Hirurgiisto, S-ro Magee, sek. de la Amerika Nacia Ruga Kruco, S-ro Winthrop, assistanta sek. de la Maristaro, kaj S-ro Hayes, assistanta sek. de Terkulturo. Tiuj sinjoroj montris ĉiuj multe da intereso rilate al Esperanto, kies nepran utilecon ili bone komprenis, kaj sincere deziris al nia movado plenan sukceson. Precipe interesigis S-ro Magee en la Rugkrucejo kaj S-ro Hayes en la Terkultura Fako. La lasta, kies laboro ankaŭ havas rilaton kun la Edukada Fako, estis multe frapita de la progreso, kiun jam faris Esperanto en la lernejoj en Eŭropo, kaj evidentigis per siaj vivaj demandoj, ke la Esperantistoj trovos ĉe li varman aprobon kaj subtenon. Sendube la vizito al tiuj eminentuloj, kaj la propagandiloj kiujn ni disdonis al ili, faciligos ne malmulte la vojon al Esperanto en la oficialaj rondojn en Usono.

#### "KIEL PLACAS AL VI."

Pro la minacanta vetero oni iom ektimis, he ne povos okazi unu el la ĉefaj eroj de la kongresa programo: la eksterdoma prezento de la Shakespeare'a teatraĵo "As You Like It," la bona kaj belstila traduko Esperanta de D-rino Ivy Kellerman-Reed. Vidigis tamen,

ke kredeble estos nur pluveto, kaj la kongresanoj kunvenis grandamase en la beletan bienon de la Bristol Lernejo por ĉeesti la spektaklon. Oni trovis tie scenejon ĉarme aranĝitan kiel arbaron, kio faris en la mistera duonlumo de la noktigo, kun la fajrmușetoj briflirtantaj ĉirkaue, plej agrablan impreson, kaj vekis ĉe la spektatoro humoron tute taŭgan por elgi la delikatan poeziecon de la ludo. La aktoraro, konsistanta el anoj de konata loka trupo sub la sperta direktado de Robert Nugent Hickman, ja ne havis facilan taskon, ellerni en la daŭro de kvin semajnoj kaj prezenti en lingvo por ili antaue nekonatan, gravan teatraĵon kia "As You Like It," sed ili tiun taskon plenumis bonege kaj lerte. Ilia elparolado, kvankam ĉe kelkaj roloj iomete "amerikaneca," estis generale rimarkinde bona, kiam oni konsideras la cirkonstancojn. Orkestro de la Nordica Mandolina kaj Gitara Klubo kaj kantistoj el la Musurgia Klubo bone kunhelpis pri la belaj kantetoj, kiuj aŭdigas en la daŭro de l' dramo, kaj entute la vespero estis granda sukceso tre ĝuita de ĉiu ĉeestinto. Nur la ĝuado estus ankoraŭ pli granda, se la aŭskultantaro estus povintaj sidi sur molaj kanapoj, anstataŭ sur la revon-malhelpantaj lignaj seĝoj provizitaj! La sekvintajn du vesperojn la prezentado estis malfermita al la ne-Esperantista publiko, kaj allogis multenombran ĉeestantaron.

#### LA LITERATURA KONKURSO.

Je la nuna merkredon matene, sub la prezido de S-ro Lowell, okazis la disdonado de premioj por la Kongresa Literatura Konkursa. Kvankam mankis la solena pompo kaj brilo de la famaj Floraj Ludoj Barcelonaj, la ĉeesto de la Regino de la Flora Kortego, S-ino Marie Hankel, igis ĉi tiun kunvenon tre ĉarma familia festeto. Prezentite de la Majstro, si diris, kiel feliĉa si estas viziti Amerikon, al kiu si portas de sia regnanaro trans la vasta maro multe da bondeziroj kaj milionon da salutoj. Poste si prezentis la premiojn al la feliĉaj gajnintoj, multaj el kiuj, je aklamaj petoj de la ĉeestantoj, devis respondi per paroladeto. Jen la nomoj, temoj, kaj premioj: S-ro Mello Souza el Rio de Janeiro por poemo pri Universala Frateco, gajnis argantan medalon; honoran mencion ricevis Prof. F. H. Loud el Colorado Springs. Similan premion ricevis F-ino Esther Higgs el Bromley, Anglujo, por prozo pri la sama temo; honora mencio, F-ino Maisch el Philadelphia, Usono. La argantan medalon por plej bona rakonto originala en Esperanto gajnis S-ro H. S. Hall el Cleveland, kaj S-ro E. L. Clarke el Clarke Universitato, Worcester, U.S.A., la honoran mencion. S-ro R. T. Bye ricevis la premion por la plej bona rakonto verkita de junulo. La premio de dek dolaroj, proponita de la Washingtona Komerca Ĉambro, por la plej bona tezo pri la Utileco de Esperanto en la Komercu, estis aljugita al S-ro W. A. Vogler en Hamburg, Germ. S-ro W. L. Church el Boston, por la plej bona tezo pri la Biblio, gajnis la premion donacitan de la Cefpastro de l' Usona Senato, kaj nia agema samideano S-ro James Robbie, en Edinburgo, por tezo pri "la Simileco inter Lincoln kaj Zamenhof," gajnis lukse binditan verkaron de la Majstro, prezentitan de anonimulo. La kunsido finigis per paroladeto de D-ro Zamenhof, kiu atentigis la gajnintojn pri la valoro — ne materiala sed interna — de la premioj, kaj esprimis la esperon, ke ĉiu premiita persono estos pro tio instigitaj al duoblighita fervoro pri nia afero.

#### DUA AGADA KUNSIDO.

Je la deka sekvis la Dua Agada Kunsido. D-ro Yemans komunikis al la Kongreso salutan telegramon senditan de Prezidento Taft: "La Prezidento dankas vin kore por via saluta telegramo, kaj sendas siajn plej bonajn dezirojn por la sukceso de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto." Varma aplaŭdado akceptis tiun afablajn bondeziron.

S-ro Chavet legis pluajn telegramojn kaj leterojn ricevitajn.

D-ro Yemans sciigis pri li bedaŭrinda morto de S-ro Montt, Prezidanto de la Ĉila Respubliko. Li proponis, ke la ĉeestantoj starigu por honori lian memoron. Ii aldonis, ke pro tiu funebro, la anoncita akcepto, farota al la kongresanoj de S-ro John Barrett en la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, ne povas okazi.

D-ro Mybs kiel ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, nun prezantis, en la nomo de sia prezidanto Generalo Sébert, raporton pri la agado de tiu komitato dum la pasinta jaro. La plej grava parto de tiu raporto (plene publikigota en la *Oficiala Gazeto*) rilatis al la Internacia Financa Konsilantaro, kiun laŭ decido de la Kvina Kongreso en Barcelono la K.K.K. devis ekstarigi kaj priraporti al la Sesa Kongreso. La raporto sciigis, ke ĝis nun elektis siajn reprezentantojn al tiu Konsilantaro Aŭstrio, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Rusujo, Svisujo kaj Usono. La K.K.K. nun opinias, ke sia tasko, en la starigado de la I.K., estas preskaŭ finita. Gi ricevos kaj publikigos nomojn de pluaj konsilantoj, ankoraŭ ne elektitaj, sed lasos al la Konsilantaro mem la zorgon, entrepreni sian propran organizadon kaj organizi sian funkciadon. Tamen, por helpi la komencon de tiu laboro, Generalo Sébert, kiel Prezidanto de la K.K.K., proponas, ke la Kongreso esprimu pri la afero siajn dezirojn. Oni trovos tiujn dezirespressojn, kiujn la Kongreso unuanime aprobis, ĉe la fino de ĉi tiu raporto, en la Oficiala Decidaro de la Kongreso.

Poste prezentiĝis diverslandaj invitoj pri la loko de la estontaj Esperantistaj Kongresoj. S-ro Postnikov, prezidanto de la Rusa Esperantista Ligo, memorigis, ke la unua Rusa Esperantista Kongreso decidis proponi, ke la Internacia Kongreso en 1912, 25-jara jubileo de la lingvo, okazu en Ruslando. La rusoj diros en Antverpeno, kiun urbon ili definitive elektis el la multaj, kiuj taŭgas por tiu celo. Rilate al tio S-ro Chavet sciigis, ke la K.K.K. antaŭ jam unu jaro ricevis proponon, ke la Oka Kongreso okazu en Krakovio, kaj ke la sama propono estis antaŭ nur du monatoj plue farita de la Unua Esperanto-Tago en Vieno, kies tri prezidantoj estis unu pola, unu bohema, kaj unu germana.

Inviton pri la Kongreso de 1913 prezantis S-ro Chavet en la nomo de la Itala Esperantista Federacio. Li diris, ke akcepto de tiu invito nepre multe vigligos nian movadon en tiu bela lando. S-ro Georges Warnier, parolante en la nomo de la Parizaj samideanoj, invitás la Esperantistarón kongresi en 1914 en Parizo, okaze de la grava internacia Esperantista festo, kiun la tieaj samideanoj projektas por tiu jaro, kaj kiu certe kunvenigos multege da Esperantistoj el ĉiuj landoj.

D-ro Mybs, vicprezidanto de la L.K. kaj ĝia Akademio, prezantas al la Kongreso la jam aluditan raporton de S-ro Boirac pri la agado de tiu du institucioj. Laŭ lia propono la ĉeestantaro levigas je la honoro de la Lingva-Komitato — kaj laŭ propono de D-ro Zamenhof je la honoro de ĉiuj Esperantistoj — mortintaj dum la jaro. Fine, komunikinte la dezirojn esprimitajn en la L.K. kunveno, li proponas je ĉies aplaŭdo, ke la Kongreso danku S-ron Boirac por lia raporto kaj esprimu sian plenan konfidon al la Lingva Komitato. Tiun proponon, subtenitan de D-ro Pollen, la ĉeestantaro aklame aprobis.

D-ro Yemans legas interesan leteron de la Prezidanto de Agada Komitato por la Universala Eksposicio, kiu okazos en Novjorko en 1913. Tiu sinjoro sciigis, ke okaze de tiu Eksposicio kunvenos reprezentantoj el ĉiuj parlamentoj de l' mondo, kiu celo fari legojn pri internacia paco. Car Esperanto estas tre facile lernebla kaj uzebla, li proponas, ke oni klopodu por

interesi pri Esperanto la partoprenontojn kaj se eble instruu ilin pri la lingvo. Li sugestas, ke oni aranĝu je la sama okazo kongreson de Esperanto en Novjorko.

#### ESPERANTO ĈE LA LABORISTARO.

Post fermigo de la oficiala parto de la kunsido, ricevis la parolon S-ro Frank Morrison, Sekretario de la Amerika Federacio de Laboro, grava ligo kiu kunigas la Meti-unuiĝojn de pli ol du milionoj da Usonaj laboristoj. Li venis al la Kongreso speciale por konstati, ĉu efektive Esperanto havas praktikan valoron. Tio, kion li vidis, kaj la tuja kompreneceo kaj entuziasma akcepto de lia parolado, frazon post frazo tradukita Esperanten de la skribanto, suficiis ja por konvinki lin. Ni donas laŭvorte lian interesan paroladon, kiu certe havos tre grandajn kaj gravajn sekvojn por nia movado inter la tutmonda laboristaro:—

"S-ro Prezidanto kaj Delegitoj,—En ĉi tiu Sesa Internacia Kongreso de Esperanto mi deziras diri, ke estas por mi plezuro, renkonti la reprezentantojn de dudek tri diversaj nacioj, kiuj parolas lingvon internacion. Mi donas al vi mian certigon, ke se iam en la estonteco mi denove havos la plezuron vin renkonti, mi provos paroli kun vi en tiu sama internacia lingvo Esperanto.

"Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis ankoraŭ junulo, ni provadis interparoli per lingvo, kiu, kvankam malsama de la angla, estus tamen kompreneata de la angle-parolantaj popoloj. De tiu tempo farigis kvardek atū kvindek provoj, starigi universalan lingvon, sed estas nur en la daŭro de la lastaj kelkaj jaroj, ke el diversaj partoj de la mondo, ni atidis pri ĉi tiu lingvo Esperanto, kiu ĉie ricevas tiel grandan sukceson.

"Kvankam mi ankoraŭ ne posedas suficien konon aŭ sperton pri la lingvo por scii, ĉu ĝi taŭgas por ĉiuj bezonoj, mi tamen hieraŭ vespere ĉeestis, en ĝardeno en ĉi tiu urbo, teatran prezentacon, en kiu la ludado prezentiĝis ĉiujn pasiojn hereditajn de l' homaro, kaj kvankam mi ne povis kompreni la internacion lingvon, estis tamen por mi tute facile, sekvi la amscenojn de la du ĉefaj aktoroj, kaj mi rimarkis, kiel bone la Esperantista atskultantaro komprenis la tutan ludadon. Car tiel estas, mi sentas, ke la lingvo tute suficias kiel interkompreneilo por komercaj kaj diplomataj internaciaj rilatoj.

"Ci tie mi dezirus diri, kial la sukceso de la universala lingvo speciale min interesas. Ekzistas en preskaŭ ĉiu lando de la mondo organizitaj laboristaj unuiĝoj. Ĉiun trian jaron okazas kunveno, ĉe kiu la organizita laboristaro de ĉiu lando estas reprezentataj de delegitoj diversnaciaj, ĉiu parolanta sian propran lingvon.

"Mi kredas, ke per la alpreno de universala lingvo ili povos konduki tiujn kunvenojn tute same facile, kiel vi hodiaŭ kondukas ĉi tie la vian. Tiumaniere, ĉiuj delegitoj povos prezenti al ĉiuj ceteraj delegitoj sian propran personan vidpunkton, vive kaj senpere, kaj kunhelpas tiel al la internacia unueco kaj frateco, kiu ne estas starigebla alimaniere.

"Mi petas al la diversaj delegitoj, ĉi tien kunvenintaj el la landoj trans la oceano, ke reveninte hejmen ili klopodu pri ĉi tiu demando de universala lingvo, ĉe la reprezentantoj de la organizita laboristaro en siaj respektivaj landoj. Finante, mi deziras esprimi miajn plej bonan esperon por via plena sukceso, kaj ankoraŭ la esperon, ke en la proksima estonteco oni uzos tra la mondo unu komunan lingvon, per kiu ni povos esprimi nian amon al la tutaj homoj familio kaj al la anoj de ĉiuj nacioj, kaj tiu lingvo, mi plue esperas, estos Esperanto."

La posttagmezo estis difinita al ekskursuo al Mount Vernon, la hejmo kaj tombejo de George Washington. Bela vetero — agrable varma, sed tute ne tro varma — favoris la kongresanojn, kiuj trovas tre interesan la malnovan domon, ĉarne lokitan sur altaĵeto apud la

Potomac. Ĝi estas tipo de la prastila Sudusona planteja biendumo, kun speciaj ejoj por la sklavaro, kiun oni en tiu epoko kutimis posedii. La domo estas nun konservata de la Usona Registaro. Ĝi estis atingebla aŭ per elektra rapida veturanta tramo aŭ rivero per vaporŝipo. Kelkaj el ni, inter sangante kun aliaj samideanoj la biletajn, povis ĝui ambaŭ vojojn, kaj trovis speciale ĉarma la revenon laŭ la belaj bordoj de la Potomac.

Vespere tiu senlaca propagandisto, S-ro Richard Sharpe el Torquay, faris, laŭ speciaj petoj de multaj amerikaj samideanoj, anglalingvan paroladon pri la norma elparolado de Esperanto. Kiel bone scias niaj legantoj, S-ro Sharpe estas kvazaŭ specialisto pri tiu temo, kiun li ofte priparolis kun la Majstro, kaj la usonaj amikoj trovis liajn rimarkojn plej instruaj kaj utilaj, montrante sian intereson poste per viglega pafado de demandoj.

#### "BASEBALL."

Multaj Esperantistoj — inter ili la Majstro — iris posttagmeze por vidi la "basbalan" konkurson inter la Cleveland kaj Washington ludistaroj. La misteroj de tiu nacia ludo, kiu vekas la entuziasmigon de multmiloj da junaj kaj maljunaj sportistoj tra tuta Usono, estis klarigitaj detale en Esperanta libreto speciale eldonita de la konata firma Spalding, tre lerte tradukita de iu pseŭdonomita "Erik." S-ro T. S. Rice, sport-redaktoro de la *Washington (D.C.) Times*, diras tie, ke "ĉiu Esperantisto devus koni 'basbalon,' ĉar nenio tiom helpas al la kreskado de lingvo, kiel tiu ludo." Efektive, oni povus tion kredi, legante pri la florema slango uzata de ĝiaj adepto, kiu igas raporton pri la ludo tute nekomprenebla por la profanulo. Evidente la ludo postulas grandan lertecon kaj fortikecon, kaj oni diris al mi, ke plej bona profesia batisto aŭ jetisto povas gajni ĝis 1,000 dolaroj en monato. Unu estis eĉ tiel populara, ke li povis starigi kiel reprezentanto por sia ŝtato en la Usona Cefparlamento. La spektatoroj, pro sia entuziasma tintilsonorado kaj strangaj blekoj de gojo aŭ malaproblego, memorigis min iom pri la ĉeestantoj en la batalo de toroj en Barcelono. Certe la ludo devas esti tre interesa kaj alloganta, kiam oni funde ĝin komprenas, sed persone, post duonhoro da rigardado, mi jam "havis sufice," kaj foriris al la "Marista Kazerno" por ĝui la bonegan muzikon de la Marista Orkestro, unu el la plej famaj muzikistaroj en Usono, ĉe kiu specia lokaro estis rezervita al la Esperantistoj.

Dum la vespero S-ro Chavet el Parizo, kvazaŭ heroldo por "la Sepa," faris paroladon kun lumbildo pri Antverpeno. Lia interesa parolado, kaj la bele presita kaj ilustrita broŝuro pri tiu urbo, kiun disdonigis la belgaj samideanoj, certe logos al Eŭropo proksiman jaron grandan amason da Usonaj amikoj. Paroladis ankaŭ Prof. Spillman pri "Videbla Parolado," sciencista sistemo kiu celas priskribi por surduloj la parolsonojn per speciale formitaj literoj. Tiun sistemon verkis Prof. A. Melville Bell, patro de la elpensinto de la telefono. Oni povas ricevi detalajn sciigojn ĉe la Volta Bureau en Washington (D.C.).

#### KUNSIDO DE L' U.E.A.

De la 9a ĝis la 10a horo estis dediĉita al agadaj kunsidoj de la diversaj distriktoj de la Esperantista Asocio de Nord-Ameriko, por elekti konsilantojn.

Je la 10a horo okazis generala kunsido de la UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, en la salonego de la Hotelo Arlington. Pastro P. Hoffman (Del. Baltimore) prezidis. S-ro Schubert (Del. Washington) legis salutan leteron de S-ro Hodler, Viceprez. de U.E.A., kiu donas informon pri la lastjara progreso de U.E.A., kaj sciigas la opinion de la komitato, ke U.E.A. devus starigi en Usono centran oficejon, kun kiu korespondus

rekte ĉiuj delegitoj Amerikaj, kaj kiu estus la centro por tiu kontinento. La cetero de la kunveno farigis kvazaŭ propagando, laŭ propono de S-ro Warnier el Parizo, kiu diris, de ĉar la duono de la ĉeestantoj ne estas ankoraŭ Esperantianoj, bone estus doni al ili kelkajn klarigojn pri la celo, kresko kaj agado de U.E.A. Li poste do montris per trafa parolado la grandan praktikan utilacon de tiu Asocio, kaj gian pli kaj pli rapidan sukceson. Li finis invitante ĉiujn ankoraŭ ne aliĝintojn, aliĝi al U.E.A.

Paroladis ankaŭ S-ro Hodges, konata ĵurnalisto, kiu sub la pseŭdonimo de "La Optimisto" regule skribas multe ŝatatan artikolon en la tre disvastigita gazeto Filadelfia *North American*. Li sprite kaj kortuse rakontis, angle, kiel li konvinkigis, ke Esperanto, la lingvo de l' Optimismo, estas la ideala lingvo por internaciaj rilatoj. Lian paroladon, varme aplauditan, tradukis po-fraze la skribanton.\*

Kelkaj vortoj de D-ro Zamenhof, kiu salutis al ĉeestantajn Esperantianojn kiel "kamarado en U.E.A.", finis la kunvenon. La dua kunveno, kiu okazis la sekvantan tagon, estis difinita tute al akcepto aŭ diskuto de la multaj presitaj kaj disdonitaj raportoj, voĉdonitaj en Augsburg.

#### EN LA OFICEJO DE L' AMERIKAJ RESPUBLIKOJ.

Ni jam diris, ke la anoncita akcepto de S-ro Barrett, Prezidanto de la Esp. Asocio de Nordameriko, al la Esperantistoj ne povis oficiale esti farata, pro la subita morto de Prezidanto Montt. Oni poste tamen sciigis, ke S-ro Barrett faros akcepton neoficialan kaj kvazaŭ privatan. La tutaj kongresanaroj do iris ĵaŭdon vespere al la loko difinita, la Internacia Oficejo de Amerikaj Respublikoj, kies estro S-ro Barrett estas. La Oficejo, kies koncepton oni dankas al S-ro Roosevelt, estas konstruajo rimarkinde bela kaj imponanta. Enirinte tra la masivaj pordegoj oni troviĝas antaŭ ĉarma meksika *patio* malfermata al la ĉielo. Meze de arta baseno sprucas elektrekolorita fontaneto, kaj ĉe la anguloj de la korto kreskas aro da ombrantaj palmoj kaj diversaj arboj, po unu el ĉiu lando Amerika. Ambaŭ-flanke de tiu *patio*, larga marmora ŝuparo kondukas supren ĝis vasta ĉefsalonego. Ĉe ties eniro staris S-ro Barrett kaj kun bonkora rideto kaj kelkaj afablaj vortoj bonvenigis la Majstron kaj la samideanojn. Preteririnte la belege ornamitan halegon oni alvenis en flankan ĉambreton, kie elegantaj lakeoj servis delikatajn refrešigajojn. Poste oni estis libera trapromeni kaj rigardi la vidindajojn de la Oficejo: la konsiligejo, kun ĝia grandega ovala tablo, ĉirkaŭata de la riĉe blazonitaj segoj, po unu por ĉiu respubliko; la balkonon kaj terasojn, el kie oni havis sorĉe belan vidon trans herbejoj ĝis la lunlumata Potomac; la mirindan reliefigitan mapegon de Ameriko... Efektive, la Oficejo estas inda monumento al la spirito de internacia arbitracio, pro kiu ĝi konstruigis kaj kiun ĝia funkciado helpas praktike efektivi.

#### VENDREDON, LA 19AN.

La fruan parton de vendreda mateno la pli laboremaj kongresanoj pasigis ĉe specialistaj kunvenoj, el kiuj tiuj de l' pacifistoj, instruistoj kaj la teozofoj kolektis plej multe da ĉeestantoj. Kunsidis ankaŭ, sed malpli multenombra, la financistoj kaj poŝtoficiistoj. Personoj mi povis ĉeesti nur la tre sukcesan teozofan kunvenon, sed amikoj, kiuj ĉeestis aliajn kunvenojn, diris ke en ĉiuj oni havis tre interesan kaj amikan diskutadon.

Posttagmeze je la kvina okazis festeto, kiu estis

\* Unu el la plej interesaj incidentoj de l' Kongreso estis la neformala kunveneto, kiun oni arangis la antaŭan vesperon por amike akcepti S-ron Hodges inter la naciaj delegitoj. La senĉesa kaj viglege viva babilado kaj bercado inter la dudeknacia ĉeestantaro kaj la spritaj demandoj kaj respondej, kiun pere de tradukoj faris al ĝi la "Optimisto," nepre estus konvinkinta la plej malmolege stultan nekredemulon pri la ĉiotatigeo de Esperanto.

plua signo de la aprobo, kiu kiu la Usona Registro rigardas nian movadon. S-ro Huntington Wilson, unua adjunkta sekretario de l' Departemento de la Ŝtato, kiu pro la foresto de l' Prezidanto kaj la Sekretario de l' Ŝtato estis la plej altranga oficisto en Washington, kun sia edzino faris neformalan akcepton al la Estraro de la Kongreso kaj la diversaj naciaj delegitoj. Ĉeestis ankaŭ kelke da personoj el la naciaj ambasadorejoj en Washington. Estis bona okazo por propagando, kaj dum oni trinketis teon kaj manĝetis kuketojn laŭ la ĝentila maniero deca ĉe tiaj ceremonietoj, oni klarigis al iliaj diplomatiistaj moŝtoj la ĉarmojn de Esperanto kaj la Esperantismo. Por tio tre utilis la multlingveco de nia Esperantista delegitaro, ĉar mi persone aŭdis vivajn babilojn en angla, franca, germana kaj hispanalingvoj. Tiu denova kvazaŭ oficiala rekonon pri la akceptindeco de Esperanto estis gracia ĝentilajo, kiun la Esperantistoj multe ŝatis.

#### LA INTERNACIA BALO.

Unu el la plej agrablaj okazoj de Esperantista Kongreso estas la internacia balo, al kiu la gejunuloj — kaj kiu Esperantisto, almenaŭ spirite kaj temperamente, ne estas junaj! — sin dediĉas kun tiom da fervoro, kiom al la propagando. Kompreneble do la gaja dancado, kiu havis lokon vendredan vesperon en la bela salonego de la "Arlington," estis tre granda sukceso. Mankis ja la belaj naciaj kostumoj, kiujn oni vidis en Cambridge kaj Dresden, sed tio ne malhelpis la dancardon! Oni vidis tamen ne malmulte da uniformoj, Kolonelo Pollen portis sian kutiman miksdevenan kaj moŝtegan vestaĵon kiel Rego de Esperantolando, la longega S-ro Baff paſadi simbole tien-ĉi-tien en la "Stelstrioza" kostumo de "Onklo Sam," kaj la sinjorinoj portis robojn, kiuj estis konstranta plezuro por la okulo. La programo, kiu laŭ Usona kutimo konsistis preskaŭ eksklusivie el dutempoj kaj valsoj, estis iom aventuroplena por la Eŭropanoj. La dutempo tute ne estas tiel facila, kiel ĝi ŝajnas, kaj la valso estas nur dutempo alivestita. Se la kompatinda alilandulo trovis usaninon kun... simpatiaj piedoj, bone; se ne... Pli sendangere estis, danci kun samlandanino! La du solaj alispecaj dancoj, la "Virginia Reel" kaj la "Filipina Danco," havis nomojn, kiuj antaŭvidigis ion novan, sed la unua estis simple nia "Roger de Coverley" kaj la alia — ja tia bele kaj gracie dancita de ok paroj de junaj filipinoj, estis simple la "Kvadrijo"! Sed malgraŭ tio la vespero estis plene ŝojiga, de la solena Parada Promenado, kiu ĝin komencis kaj en kiu partoprenis egale junuloj kaj nejunuloj, ĝis la lasta rapida valso. La muziko, ludita de anoj de la fama "Marine Band," estis sufiĉe vigliga kaj rapidiga por kontentigi eĉ la plej Usone antaŭeneman samideanon, kaj la mangajetoj servitaj mezvespere estis bonegaj. Multe aplaudita kantado de S-ino Williams estis plua ŝoko en ĉiel agrabla festo.

#### LA SOLENA FERMA KUNSIDO.

La Ferma Kunsido okazis je la deka sabaton matene en la granda salono de la hotelo. D-ro Yemans prezidis. Li diris, ke neniu povas dubi pri la granda sukceso de la Kongreso: neniam antaŭe ni vidis inter tiel multe da registaraj delegitoj. Ni ŝuldas dankon al ĉiu, kiu helpis kaj prizorgis la Kongreson: al la Gemajstroj kaj la eksterlandaj amikoj, kiuj multenombre venis tiel longan vojon; al la ĵurnalistoj, kiuj tiel afable raportis pri la Kongreso; al S-ro Reed kaj la Loka Komitato pro ilia senlaca klopozado.

S-ro Chavet legis la telegrafojn plue ricevitajn. Salutis la Kongreson — parolante Esperanton por la unua fojo — delegito de la MEKSIIKA registro, kaj deziras al nia afero plej grandan sukceson.

S-ro Cooper, en la nomo de la Ŝtato Oregon, kaj poste S-ro Haupt, en la nomo de la Panam-ekspozicio Komitato, proponas, ke ja Esperantistoj kunvenu por sia

Internacia Kongreso en 1915 en New Orleans, okaze de la granda ekspozicio, per kiu oni en tiu dato intencas festi la malfermon de la Panama Kanalo. Festante la forigon de grandega baro fizika, oni samtempe festu la forigon de la spirita baro de la lingvoj.

Ilin sekvas S-ro Lewis, kiu en bela kaj elokventa parolado proponas, ke la Kongreso de 1915 okazu en San Francisco. En tiu multinacia urbo, belege lokita apud la Pacifika Maro, ja intertuas la Oriento kaj la Okcidento, kaj la "Golden Gate" estas kvazaŭ centra trairejo por Eŭropo, Ameriko kaj Azio.

Poste parolas S-ro G. Dawes, kiel reprezentanto de la Suda Komerca Kongreso. Li subtenas la proponon de S-ro Haupt, kaj en la nomo de la Komisiono en New Orleans invitas la Esperantistojn kongresi en la fama "Kvaronluna Urbo" apud la Meksika Golfo.

D-ro Yemans, dankante pro tiuj diversaj invitoj de ne-esperantistaj korporacioj, rimarkigas, ke ilia multenombreco bone montras, kiel multe pligravigas kaj prosperas nia movado.

S-ro Joaquim Bernardo Calvos, registara delegito de KOSTA RIKO, salutas la Kongreson. Lia Registro tre ŝatas la honoron de la invito sendi reprezentanton al la Kongreso, kaj rimarkas kun kontenteco la grandan progreson, kiun faras Esperanto.

S-ro Chavet raportas pri diversaj proponoj ricevitaj de la K.K.K.: (1) Propono de la Holanda Esperantista Societo, ke la membroj de la Lingva Komitato estu elektataj de la Organizitaj Esperantistoj en la koncernantaj landoj; (2) propono de S-ro Warrington pri Ligo pri Monda Federacio; (3) propono de S-roj Twombly kaj Scott, ke oni sendu esprimon de respekto al Pastro Schleyer, elpensinto de Volapük, kaj ke oni nomu ĉi tiun Sesan Kongreson la Naŭa Internacia Kongreso, pro tio, ke okazis antaŭ la niaj tri kongresoj de Volapük.

Li sciigis, ke la unuan proponon la K.K.K. decidis transsendi al la esploro de la Lingva Komitato, kiu ceterne jam ricevis similan proponon de la Germana Esperantista Asocio.

Pri la tria, li sciigis, ke la K.K.K. proponas al la Kongreso jenan decidon: ke ne konvenas nomi nian Sesan Kongreson la naŭa internacia, kaj plue, ke ĉar la Majstro en sia parolado en Bulonjo jam esprimis per tre altaj kaj belaj vortoj la estimon kaj dankon de ĉiu Esperantisto al la eminenta elpensinto de Volapük, kaj ĉar la Esperantisto ĉiam konservis tiun estimon, ne ekzistas suficien motivo por speciala esprimo nuna pri ĝia renovigo.

Ĉe ĉi tiu punkto D-ro Zamenhof starigas kaj diras: "Pri la ĵus farita propono permesu al mi diri kelkajn vortojn. Mi ne scias, ĉu S-roj Twombly kaj Scott deziras, ke ni ĝuste nun sendu telegramon; sed pri unu afero mi estas certa, nome ke nia sincera amo al Abato Schleyer estas konstanta. Neniu pri tio dubas." (Varma aplaŭdo.)

La duan proponon legas S-ro Warrington, jene: "La Sesa aŭdis kun plezuro, ke la Usona 'Congress' (Parlamento) ĵus adoptis rezolucion, ke la Prezidanto de la Unoigitaj Ŝtatoj nomau komisionon de kvin personoj rilate al universala paco, kaj ke tiu rezolucio devenis de la Ligo pri Monda Federacio en Novjorko, kiu ĝin antaŭenpuŝis ĝis sukceso." D-ro Yemans subtenas, kaj la ĉeestantoj unuanime aprobas la proponon.

#### STATISTIKO PRI LA KONGRESANOJ.

S-ro Chavet donas interesan analizon pri la nombro de la kongresanoj. Li diras, ke enskribiĝis entute 357 membroj. Tiu statistiko tamen estas sensignifa sen interpreto. El la aligintaro 274 estas usonanoj, de 35 diversaj Ŝtatoj el la tutaj 46. Kiam oni konsideras, ke Usono enhavas dekoble malpli da Esperantistoj ol Eŭropo, sur teritorio egale granda kaj tial kun egala

malfacileco de vojaĝado, kaj ke Esperantistoj Kongreson en Eŭropo ĉeestas mil Eŭropanoj, oni vidas, ke por konservi egalajn proporciojn en Ameriko bezonas nur 100 ĉeestantoj. Tial oni devas esti tre kontenta, ke kunvenis ne nur cent, sed pli ol tricent! Da Eŭropanoj, estis 62; el Ameriko eksterusona, 17. Entute, 23 nacioj estis reprezentitaj.\*

S-ro Francisco Sanchez Latour, registara delegito de Gvatemala, kiu ĝis nun ne povis ĉeesti, salutas la Kongreson. Li diras, ke vojaĝinte tra Eŭropo, li ofte povis nur malfacile komprengi sin. Li esperas, kaj eĉ povas antaŭdiri, ke post malmultaj jaroj ĉiu uzos Esperanton por siaj rilatoj kun aliaj landoj. Estas granda honoro por li, reprezentanti sian registaron ĉe la Kongreso, kaj li faros ĉion eblan por helpi al siaj samlandanoj la lernadon de la nova kaj tiel utila lingvo.

Alproksimigas nun la fino de la kunsido. S-ro Warner levigas por esprimi la koran dankon de la Eŭropaj kongresanoj al la Usonaj samideanoj pro ilia tre gastama akcepto. Li esperas, ke ĉi tiu unua Amerika Esperantista Kongreso Internacia rezultigas progreson eĉ pli grandan, ol sekvis la kvin antaŭajn Kongresojn en la respektivaj Eŭropaj landoj. Kaj li fine certigas ilin, ke ĉiu Amerikano — kaj ili estu multaj! — kiu venos al Antverpeno la proksiman jaron, trovos tie la plej koran kaj varman bonvenon. (*Aplaŭdado.*)

S-ro H. D. King (Novjorko) proponas, je aklama akcepto, ke la Kongreso danku S-ron Charles L. Tate kaj Pastron Smiley, kiuj sukcese klopojis por enkonduki Esperanton per speciale lego en la publikajn lernejojn de la Ŝtato Maryland.

Prof. Spillman proponas, kaj la Kongreso unuanime akceptas, danki S-ron Osmena el Filipinujo kaj ĉiujn oficistojn de la Organiza Komitato de l' Kongreso.

S-ro Chavet, konstanta sekretario de la Kongresoj, legas la Kongresan Decidaron. La plej gravan oni trovos detale ĉe la fino de ĉi tiu raporto.

D-ro Yemans esprimas sian ĝojon, ke la Kongreso havas tiel bonan kaj kapablan sekretarion, kiel S-ro Chavet, kiun en la nomo de la Kongreso li kore dankas pro lia lerta kaj energia laboro. (*Aklama aplaŭdado.*)

S-ro Edwin C. Reed, kiel Loka Sekretario de la Kongreso, proponas dankojn al la Prezidento de la Kongreso, S-ro John Barrett, por la helpo, kiun li donis pri la akceptigo de nia lingvo en oficialaj rondoj; al la Viceprezidento, D-ro Yemans, kiu tiel lerte kondukis la kunsidojn; al la kvar Esperantistaj Policianoj, kiun la Policestro difinis por nin servi dum la semajno; al la organizintoj kaj geaktoroj de la teatra prezento de "Kiel Plaĉas al Vi," kaj fine al la organizintoj kaj ludintoj de la Basbala Ludo. Tiun dankaron la ce-estantoj aklame aprobis.

#### FERMA PAROLADO DE L' MAJSTRO.

Nun levigas la Majstro por fermi la Kongreson. Li diras: "Laŭ la tradicio de niaj ĝisnunaj Kongresoj, mi permisas al mi diri kelkajn vortojn de adiaŭa saluto. Mi volas diri kelkajn vortojn pri la semajno, kiun ni ĵus travivis. Kiam mi decidis veni al Ameriko, mi konfesas, ke mi komencis mian vojaĝon kun iom da dubo. Ŝajnis al mi, ke Usono estas ankoraŭ tro juna en nia movado por fari Kongreson. Oni devis tamen subteni niajn Usonajn amikojn, kaj kiam mi venis, mi vidis kun ĝojo, ke miaj duboj estis vanaj. La Sesa estis sama kiel la aliaj Kongresoj, kaj restos en nia memoro same. Mi devas esprimi mian dankon al ĉiuj helpintoj, speciale al

\* Jen kelkaj detaloj: El Usono, la Distrikto Columbia (kie okazis la Kongreso) sendis 59 anojn, la Ŝtato Novjorko 28, Ohio kaj Massachusetts po 18, Maryland 15. El la pli malproksimaj Ŝtatoj, Kalifornio sendis 4, Washington 2 (estas almenaŭ 20 lokoj kun nomo Washington en Usono!), Colorado 2, Kansas, Nebraska, k.t.p., po 1. La 17 ne-uzonaj Amerikanoj venis el Brazillando, la Filipinaj Insuloj, Meksiko, Peru, Portoriko, Urugvajo, Kanado. El la Eŭropaj, Francio sendis 17, Anglujo 14, Hispanujo 9, Germanujo 7, Rusujo 5, Polujo 3, k.t.p. Afriko donis 1, Aŭstralio 2, kaj Hinujo 2.

Gesinjoroj Reed — ĉion vi vidis, mi do ne ripetas — ankaŭ al ĉiuj, kiuj helpis. Krom tio, ni ŝuldas dankon al la lando mem, por la invito, kiun faris la Usona Registaro al aliaj landoj. Estas tre grava fakteto, ke 13 Registaroj estis oficiale reprezentitaj. La lokaj aŭtoritatoj ankaŭ montris al ni grandan helpon, kaj en via nomo mi ilin kore dankas.

"Nun ni rigardu, ĉu la Kongreso donis iajn rezultatojn. Pri tio neniu dubas. La rezultatoj estos tre gravaj. Ĝi forte levos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo. Kaj ankaŭ al multaj el niaj Usonaj amikoj, kiuj ankoraŭ ne havis la okazon aŭskulti Esperanton parolatan de alilanduloj, la Kongreso sendube multe helpos pri la elparolado de nia lingvo. Mi estas certa, ke kiam ni ilin revidos, ni ne plu rekonos ilin, sed demandos pri ili, el kiu nacio ili venas? Kaj nun, ĉar ni devas disiri al niaj hejmoj, al ĉiu mi diras: Felicen vojon! Felicen vojaĝon! kaj esperas, ke mi vidos grandan parton el vi en Antverpeno.

"La Sesa Kongreso estas fermita."

Kaj post kantado de "La Espero," fortepiane kondukate de S-ro Richard Sharpe, oni disigas — ĝis revido en Antverpeno...

Sed la Kongreso ankoraŭ ne tute pasis. Posttagmeze okazis agada kunsido de la Esperantista Asocio de Nordameriko, kaj vespere D-ro Pollen, antaŭ granda aŭskultantaro en la salonego de la "Arlington," faris anglalingve propagandan paroladon: "Cirkau la Mondo kun la Verda Standardo." Liaj interesoj kaj tiel diverslandaj spertoj certe konvinkis multe da ne-Esperantistoj al varbiĝo en niajn rangojn.

Kaj tiel finiĝis la Sesa...

#### KELKAJ IMPRESETOJ.

— Kaj pri Washington mem? — oni eble demandos. Ĉu tiu urbo pli plaĉis al vi, ol tiu socia enigmejo Novjorko?

— Jes. Ĝiaj belaj arbkovritaj placoj kaj parkoj, ĝiaj noblaj publikaj konstruaĵoj, ĝiaj elegantaj domoj kaj frankvilaj aleoj multe kvalifikis la impresojn, kiujn mi ricevis en Novjorko. Precipe mian koron ĝojigis la digna kaj vasta plano, laŭ kio oni antaŭprojektiĝis ĝi. Post ioman kreskadon de la komunumo. Kiam la tuto plenumiĝos, Washington estos la plej bela urbo en la mondo. Mi klare konstatis, ke almenaŭ en sia ĉefurbo la Usonanoj volas havi tipon de tiu spirito de libera kunlaborado kaj solidareco, kiu espereble en ia estonta tempo disvastiĝos tra la tuta homa socio. Sed ĝis tiu ora epoko la spirito de Washington kaj la spirito de Novjorko multe interbatalos. Tamen ia ennaskita instinkto de optimismo diras al mi, ke Washington venkos...

Nebezone estas, ke mi priskribu ĉion vidindan, kio nin tie plezurigis. Nur du-tri tipaj objekton mi volas rimarkigi kiel simbolojn de la granda socia malvolviĝo, kiu en Washington ellaborigadas: la gracie majesta Kapitolo, el kie radias spiritaj vojoj al la konsiligejoj de kvardek-ses ŝtatoj; la mirinde elpensisita kaj organizita Nacia Biblioteko, kie estas trovebla kvazaŭ tuj ekzemplero de preskaŭ ĉiu iel grava libro en la mondo; la belega drenakirita "Marista Promenejo" apud la plorantaj salikoj de la rivero, kies akvoj kaj marĉejoj iam regis nedisputate sur ĝia loko; kaj fine tiu brilanta blanka obelisko, ĉiame loganta alten la rigardo, simpla, vasta kaj frapanta kiel la Vero... Kaj pri la ceteraj belaĵoj de la urbo, ĉu ne staras skribite en la "Libro de l' Kronikoj," kiun pretigis Esperantiano Schubert, kaj kiun recenzas Lia Recenzista Mosto A. E. W. sur alia paĝo?

— Kritikoj prila Kongreso? Nu... Efektive, mi estis tiom okupata per la kongresaj laboroj, kaj la kaptado de notoj por ĉi tiu gaja rakonto, ke mi ne povas diri, ĉu estis io kritikinda! Personne, mi nienion malagrablan spertis. Kiel logejo, la "Arlington" estis bonega;

bonega ankaŭ kiel oficiala babilo ĝi estis, ankaŭ kiel kunvenejo generala. La Akceptejo, dank' al la sindonema kunhelpado de lokaj samideanoj kaj samideaninoj, glate funkcias, la Librovendejo sub la lerta direkto de l' netrudema sed laboreganta amiko Arthur Baker kaj lia helpantino enkasigis bonan monon por sistema propagando, kaj... kio restas por kritiki? se vi esceptas nur la Centran Mangejon... kiu ja, pro la nesufiðeco de la bonhumoraj sed nur home kapablaj negraj kelneroj, ne ĉiam povis nin servi tiel rapide, kiel postulas Esperantista apetito. Sed la Centra Mangejo estis almenaŭ ne kara, kaj la ĝesto faris sian eblon por kontentigi la specialan deziraron de dudek mildmanieraj vegetaranoj! Kaj jen vi havas ĉion!

#### AL NIAGARA.

Dimancon matene, multaj el ni Eŭropanoj — interalie D-ro kaj S.-ino Zamenhof — ekveturis per frua vagonaro al la fama akvofalego. Kiu ja forlasus Amerikon, ne vidinte tion? Nia kompanio estis duone tiu sama, kiu venis Novjorkon sur la "George Washington": D-roj Mybs kaj Arnhold, S-ro Winkelmann, S.-ino Thiard, F.-inoj Jahns, S.-ino Essigmann, S-ro Chauveau, kaj mi mem. La veturo estis tra belega montetara pejzago. Ĉi la observa vagono oni povis bonege ĝui la rimarkindajojn de la vojo, kiu dum multaj mejloj iris laŭ la pitoreskaj bordoj de la Susquehanna Rivero. En Buffalo, kien ni alvenis post tuttaga vojaĝo, ni devis forlasi nian komfortan "Pullman" kaj atendi inter grandega amaso da kolektigintaj ekskursantoj la alvenon de la speciala vagono por Niagara Falls. Ĝi estis plenega, kaj nur malfacile oni trovis lokojn.

Negrave, ni iel alvenos! Kaj tra la krepuska duolumo ni ekiras laŭ la bordo de la largega defluo el Lago Erie, tra kampo, trans pontoj, ĝe la mezo de ĉefaj stratoj, ĉiam kun la melankolia sonorado de la lokomotivo en niaj oreloj, ĝis pli granda bruo kaj brilo anoncas Niagara. Iom da marĉando kun tro ekspluatemaj hotelestroj, lavigo, vespermango, kaj ni denove eliras, avidaj por vidi la Falegon. Kelkminuta promeno, kaj ni staras sur la ponto, kiu kondukas al la Insulo de l' Kapro. Ni ankoraŭ ne vidas la Falojn, sed ni vidas fee belan amasegon da akvo, kiu ondegante dancas, saltas kaj disprucigas, laŭ mil fantaziaj formoj, sub la argenta lumo de la luno, kuregante en nehaltigebla potenco kaj furiozeco malsupren, ĝis punkto, kie neklare vidata pendanta nebulaĵo montras la finan profundegajon. Tien fervore ni direktas niajn pañojn, kaj baldaŭ, gvidate de la kreskanta bruego, alvenas al nigra amasigita grupo, kiu rigardas, rigardas... Estas la fama Prospect Point. Baldaŭ estas loko por ni, kaj tiam ni ankaŭ rigardas, rigardas... Kia vidaĵo! Tiu seneca kompakta alfluiganta maso da akvo, kiu dum eble tridek mil jaroj tiel same fluadis, faladis glate trans tiu rokego, dissutote en ŝaumo kaj nebulo kaj bruoj, en la fundon de tiu abismo... Kelke da pañoj pluen, oni sin trovas en kompara silento post elstaranta pinto, kaj la rigardo povas ampleksi neklare la plimalproksiman kanadan bordon, la trankvilan akvon tuj sub la Faloj, kaj la potencan arkon de la granda pendoponto, kun la lumoj de elektraj tramoj trans ĝi rampantaj... Tiel, sub la hela bela luno, ni ricevas nian unuan impreson de Niagara...

London matene la Majstro havis la plezuron vidi kelkajn membrojn el sia familio: lia onklino S.-ino Nathan Lewis, lia kuzino F.-ino Helen Lewis, kaj lia kujo S-ro Jack Zamenhof, kiujn li ne vidis de pli ol dudek jaroj! Estis en la domo de S.-ino Lewis, ke okazis tiu fama unua festo pri Esperanto, pri kiu parolas la Majstro en "Esperantaj Prozajoj," kiam la junaj gimnazianoj kunkantis pra-Esperante la himnon: "Malamikete de las naciones..." Kun la allaj si nun venis por bonvenigi sian nepon kaj lian edzinon, kaj

rekonduki ilin kun ŝi al Montrealo, kie la ceteraj familianoj senpacience atendas ilian alvenon. Gis lia foriro el Ameriko, la Gemajstroj devas esti iliaj gastoj. Estis la ŝatita privilegio de la skribanto, akompani la Doktoron kvazaŭ korpgardisto, por helpi en okazo de atako de interjuisto, k.t.p.

Kiam la samfamilianoj iom satigis sian reciprokan avidecon audi ĉiujn novaĵojn — kaj oni povas al si prezentii, kiom da rakontindajoj amasigis dum 28-jara foresto! — ni ekveturis en kaleŝo por viziti la belajojn de Niagara.

Bildigi en ilia tutu ĉarmo la mirindajojn de tiu fama loko estas neeble; tiom multe la realeco superas ĉian priskribon. Kiu plomo povus esperi fiksi sur papero la potencegon de l' spektaklo de la Kanada Falego, vidata el Luna Insulo? Kiu vortpentristo povus esperi kapti la milmil saltantajn ondigojn kaj ŝaŭmigojn de la Rapidoj en la Granda Gorgo? Ĉe fotografaĵo plej preciza ne sukcesus sentigi al nevidinto la vastan pulsantan vivantecon de l' tieaj akvofortoj. Nur la memoro fidele konservas la bildon...

Efektive, en tiu tago ni travivis multon... Kvazaŭ kinematografie, diversaj epizodoj ekmovigas en mia memoro... Mi vidas la Majstron komike aspektantan en la oleizita vesto kaj kapuço, kiun oni al ni surmetis por ke ni povu sen malsekiĝo iri sub la Falego sur la Kanada flanko. Malsupreniro per listo, kaj jen tra gutetanta koridoro elborita el la roko, ni alvenas al unua elrigardejo malalte lokita, truo el kie oni vidas, ankoraŭ de antaŭe, la faladantan fronton de la akvo. Apude, arke elspruciĝas el la roka muro la granda verda flufasko de ia turbinejo. Pluen gis dua truo, kun la bruoj nun multe pli granda, kaj fine ni staras ĉe la tria kaj lasta truo, kaj rigardas eksteren. Kia spektaklo! Ni estas rekte sub la Falego, kaj vidas ĝian malantaŭan flankon! De ie supre ŝutigas kun terura forto la tutu masego de l' akvo, kaj kun bruego disfrakasigas kontraŭ la rokoj je kvar metroj de niaj piedoj. La bolegado kaj blovegado de l' aerfluoj, kiuj furiozas ĉe tiu kaldrono sub la falanta arko de l' akvo, estas nepriskribebla. Duonblindigite de l' ĉiuflanken pelegata ŝaŭmo, surdigite de l' muĝego, kun konfuzitaj sentoj oni staras, staras sorĉate kaj rigardas...

Post tiu sensima sperto ni veturas pluen por vidi la Rapidojn. Plua ekstazo antaŭ pluaj mirindajoj, kiujn... mi ne provos priskribi! Kiel faris jam sendube miloj kaj miloj da turistoj, ni lasas fotografi nin sur la bordo apud la fluego. Foliumante la libron de l' vizitantoj en la fotografista dometo, ni trovas la nomon de Kolonelo Pollen, kiu ĉeestis tiun lokon dum sia propaganda vojaĝo lastan jaron. Ĉe la elirejo de la Ŝurfervojo, per kiu oni reiras la supron de la Gorgo, mi trovas en la butiko de memorajoj ekzempleron de l' BRITISH ESPERANTIST. Montrigis, ke ĝi apartenis al una el la komiziinoj, kiu iom eklernis nian lingvon.

Unu plua impreso pri Niagara, kaj ni devos repreni nian vojon al Montrealo. Oni ne povas viziti Niagara, ne rimarkante, kiom la homoj ekspluatas la grandan akvofalon. Unu aspekto de tiu ekspluatado tute al mi malplaĉis, la aspekto, kiun ni vidis tuj ĉe nia alveno. Ciuflanke, sur la Usona bordo oni trovas memorajeojn, pošt-karteojn, hotelojn, hotelaĵojn, restoraciojn, manĝejojn, k.t.p., kies evidenta sola celo estas, elpozi kiom eble plej multe da mono al la ekskursistoj, kiuj milope vizitadas la lokon. Tiu spektaklo de l' homa komercemo, apud tiu mirinda belajo de l' Naturo, iel ofendas kaj vundas. La bananoj kaj ŝiritaj ĵurnaloj postlasite de fi-turistoj en la plej ĉarmaj lokoj, ne helpas kuraci la doloron de l' poeta koro! Stranga miksaĵo, la homo!

Pri la alia aspekto de l' ekspluatado, ve-kriadis kaj denuncis publicistoj en ĉiu parto de l' mondo. Rigardante el Prospect Point al la Kanada flanko, la vizitanto vidas, tie malsupre apud la piedo de l' bordkrutajo,

malhelan malaltan konstruojon el ŝtено. Dekstre, super senzorge ŝutitaj amasoj de rubajo, staras la maleleganta trabaro de iaj mašinajoj. Tiu tute ne-pitoreska afero estas turbinejo, kies elektra forto funkougas dinamojn kaj lumigas urbojn en radio de du cent mejloj. Pli suden, tri pluaj elektropunktejoj malternamas la pejzagón. Sendube naskigas aliaj. Kaj sur la Usona flanko staras la malbela būdaro kaj turaro de granda fabrikejo de aluminio, ankaŭ profitante la forton de la Faloj... Nu, persone, mi ne domagis tiun ekspluaton de l' akvo. Estas por mi io altpensiga en la ideo, ke en la homo estas potenco, pli forta kaj vasta, ol tiu mirinda akvofluo, potenco kiu iam post iam malkaſas kaj utiligas ĉiujn sekretojn de l' materio, la potenco de l' homa spirito. Nur mi bedaŭras, ke la ingenieroj ne sciis helpigi sin per la Arto, por doni al siaj laborejoj formon pli bele taŭgan kaj simbolan pri la du grandaj Fortoj, Homa kaj Natura, kiuj ilin konstruigis. Kaj ankaŭ ion mi bedaŭras, pensante, ke eble la fina faro de parto el tiu elektra forto estos, funkciiĝi lumanoncon por la "Purpuraj Purigaj Piloloj" de ia ĉarlatano... Sed negrave! Ne ĉiam la homo laboros al banalaj celoj...

#### SUR LA VOJO KANADON.

Kaj nun, antaŭen al Montrealo!

Tiu urbom ni volis atingi per vojo de Lago Ontario kaj la rivero S. Laŭrenco, multe pli bela ol la veturo per la fervojo. Ni ekiris el Lewiston per la "Kingston," granda vaporŝipo kun tripla vico de ferdekoj laŭ la tipo kutima sur la Jagegoj. Car estis la ekskursa sezono, malfacile estis trovi kajutojn—ni pasigis pli ol tridek horojn por trairi la tutan longon de la lago—kaj ni eĉ iom eksitimis, ke la "Gemajstroj" devos dormi sur sego. Ni baldaŭ jam ne povis plu distingi la Usonan bordon, kaj efektive oni facile kredus esti sur la oceano. Toronton ni bedaŭrinde ne povis bone traviziti pro manko de tempo. D-ro Mybs, S.-ino Tiard, kaj aliaj samideanoj, kiuj alvenis pli frue en la tago kaj reunuiĝis kun ni sur la ŝipo, diris, ke la urbo estas tre vidinda. En Kingston ni devis transigi en ŝipon malpligrandan, la "Rapids King," car gis ni alvenos en Montreal ni trairos multe da rapidoj. Antaŭ ol atingi la unuan, ni devis trairi la saman Lagon de la Mil Insuloj. Tre belaj estas la verdaj ombraj bordoj de tiuj ĉarmaj libertempejoj, kaj la elegantaj somerlogejoj, kiujn multe da riĉuloj konstruigis sur ili.

La trairo tra la rapidoj estas interesa kaj ekscitanta sperto. Ili estas ses, el kiuj la ĉefaj estas tiuj apud Lachine. La strangaj turnigoj kaj kirligoj de la fluo pli kaj pli multigas, gis fine, per lentega pilotado kaj dum komuna spirotenado la ŝipo trairas malsupren inter du proksimaj tavoloj da roko en la denove trankvilan akvon de l' rivero. Ni veturas pluen preter Caughnawaga, la Indiana rezervejo, kiun priskribis tiel interesante S-ro Claudius Colas en la Londona Klubo, kaj fine, pasinte sub la mirinda Victoria Jubilea Ponto, ni vidas la kamentubaron de l' Montrealaj fabrikejoj, la grenelevatoroj kaj dokojn de l' industria kvartalo, kaj la majestan silueton de Mont Royal en la malantaŭajo.

#### EN MONTREALO.

Sur la enspipejo atendis areto da pluaj kuzoj kaj kuzinoj de l' Majstro. Okazis ĝoja familia reunuiĝo, intima sceno en kies feliĉeco mi ankaŭ, estante ano de la "granda rondo familia," partoprenis kun kora konsento. Oni nin kondukis en la bela familia aŭtomobilo al la Hotelo Windsor, kie ni devis esti dum kelkaj tagoj la gastoj de "kuzo" Louis Zamenhof. Tiu saman vesperon festeneto, kiun ĉeestis dekdu Zamenhofoj aŭ ho-Zamenhofoj, inaŭguris la alvenon de la Majstro en Montreal.

Kvankam la Doktoro vojagis nun por tiel diri nur "private," li devis submeti sin la morgaŭan tagon al

intervjuo de redaktisto de la *Montreal Daily Star*, en kiu poste aperis pli ol unu kolono da raporto pri nia afero. La ceteran tempon de sia restado en Montrealo la Gemajstroj pasigis tre plezure en veturoj kaj ekskuroj kun sia parenco. Dum la somero la familio okupas belan kamparan dometon en Beaconsfield, dudek mejlojn for apud la S. Laŭrenco. Du-tri fojojn ni iris tien aŭtomobile, kaj la rapida veturo laŭ la bela bordo de la rivero estis sperto tre plezuriga. La intimaj kunvenoj en la ĉarma villo estis tre agrabla. Neniam mi vidis familion pli unuecan, pli ame interligitan en ĝiaj anoj. Estis efektive pli ol unua familio : S.-ino Nathan Lewis (la onklino), F.-ino Helen ŝia filino; ŝiaj aliaj filinoj Stephanie kaj Eugenia kun siaj edzoj S.-ro Jacobs kaj S.-ro Levy; ŝia filo S.-ro Felix; kaj ŝiaj nepoj S.-ro Jack kaj Louis Zamenhof. Krom tiuj estis ankorau S.-eto Reginald kaj S.-inetto Natalio, la infanoj de S.-ino Jacobs, kaj fine la infaneto de S.-ino Levy. Estis amuze kaj plezure por la Majstro, aŭdi la bravajn ekprovojn, kiujn faris liaj belaj kuzinoj por paroli Esperante. Ili promesis bone gis ĝin ellerni ĝis la Antverpena Kongreso, kiun ili esperas ĉeesti ope. Eĉ la knabcoj Reginald volis saluteti Esperante sian onklon, kaj faris specialan verdan standardeton por flirtigi ĉe nia alveno. Tiel, per babilado kaj muzikado — car la kuzinoj bele kantis kaj estis rava plezuro aŭdi ilin, Polinojn, ludis la muzikon de Chopin — la kelkaj tagoj rapide pasis. Sed ĉio devas iam ĉesi — atendas la Majstron liaj profesiaj devoj en Varsovio — kaj ian vesperon la familio staras en la Grand Trunk Stacidomo en Montreal, antaŭ la vagonaro kiu portos la amatajn "ge-kuzojn" al Novjorko, por enspipegi Eŭropon, al la malnova hejmo trans la maro en Varsovio... Kun ama zorgo ili rezervis al la Gemajstroj specialan saloneton, kie ili povos komforte dormi dum la tutnokta vojago. Kortuſate ili ĉirkaŭprenas kaj kisas ĉiun parencon, staras ankorau mallongan tempon sur la ŝtupo; sonorilo sonas, ankorau kelkajn momentojn ni vidas la karan amindan personeton de la Doktoro kapsignanta adiaŭon... kaj jen ili estas for. Kun sento preskaŭ nostalgia de persona perdo kaj manko, mi forlasas la stacidomon. Longe mi memoros tiun scenon, kaj la ĉarmajn tagojn, kiujn mi travivis ĉe la gastama Zamenhofa familio en Montreal...

Mia longa rakonto estas nun preskaŭ finita. Unu pluan semajnon mi pasigas en Kanado, ĉe mia onklo en St. Lambert, kaj tiam, kun S.-ro Warden el Edinburgo enspipegas sur la "Laurentic" por Anglujo. Post rapida kaj agrabla vojago ni alvenas en Liverpool.

#### EPILOGO.

Nu, mi vidis Amerikon, vidis la Amerikajn samideanojn. Mi revenas certa, ke nia movado tie baldaŭ tre potence antaŭeniras, kaj mi tiun certecon havas, car mi persone konatigis kun la fervoreco kaj sindonemeco de la samideanoj, kiuj faros kaj partoprenos en tiu antaŭenirado, kaj plue ĉar mi scias, ke malgraŭ la komercema spirito de multaj Usonanoj, Usono estas ankaŭ lando, kie bele floras jam multe da tiaj idealaj movadoj, kiaj la Esperantismo. Al la multaj novaj amikoj, kiujn mi faris dum mia vojago, mi sendas trans la maro vivan memorigan saluton, kaj korajn bondezirojn por la plena sukceso de ilia klopodado. Gis revido en Antverpeno!

W. W. MANN.

#### Kongresa Decidaro.

*Oficiala Gazeto.* — La Sesa Kongreso memorigas al ĉiuj societoj kaj grupoj, ke la abono al la *Oficiala Gazeto* estas unu el la plej bonaj rimedoj por helpi financi la oficialajn instituciojn de Esperanto, kaj por esti regule informata pri iliaj laboroj.

*Internacia Konsilantaro.* — La Sesa Kongreso es-

primas la deziron, ke la landoj, kiuj ĝis nun ne ankoraŭ sendis la nomojn de siaj delegitoj, faru tion kiel eble plej frue. — La Sesa Kongreso esprimas la deziron, ke la konsilantoj nun elektitaj tuj komencu sian laboradon, kaj konsideru sin kiel unuan rajtigitan kernon de la Internacia Konsilantaro. — La Sesa Kongreso esprimas la deziron, ke la Internacia Konsilantaro uzu la peron de *Oficiala Gazeo* por publikigi ĉiujn siajn laborojn, dokumentojn kaj komunikojn. — La Sesa Kongreso esprimas la opinion, ke estas necese, ke la Internacia Konsilantaro prenu sur sin la ta-kon faciligi la amikajn rilatojn inter la propagandaj societoj por comunaj propagandaj celoj.

*Lingva Komitato.* — La Sesa Kongreso dankas S-ro Boirac pro lia raporto pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj la Akademio inter la Kvina kaj la Ses Kongresoj, kaj esprimas sian tutan konfidon al tiuj institucioj.

*Sidejo de la Proksima Kongreso.* — La Sesa Kongreso notas por la postaj jaroj la invitojn aŭ proponojn okazigita Kongreson de 1912 en Rusujo aŭ en Krakovio; la Kongreson de 1913 en Italijo; la Kongreson de 1914 en Paris; kaj la Kongreson de 1915 en New Orleans aŭ San Francisco; kaj dankas la personojn, kiuj faris tiujn invitojn aŭ proponojn.

*Propono de la Holanda Societo Esperantista.* — La Sesa Kongreso resendas por esploro de la Lingva Komitato la proponon de la Holanda Societo pri elekto de Lingva-komitatanoj.

*Propono de S-roj Twombly kaj Scott.* — La Kongreso decidas, unue: ke, ĉar S-ro Schleyer ĉiam havis la estimon de la Esperantistoj, ne estas sufice preteksto por gin reesprimi hodiaŭ speciale; due, ke ne konvenas nomi la Sesan Kongreson la Naŭa Internacia.

*Noto.* — Aliaj decidoj, kaj la diversaj oficialaj dankoj, estas skribitaj en la generala raporto. — W. M.



## Impresoj pri Augsburg kaj U.E.A. Kongreso.

De H. BOLINGBROKE MUDIE, *Prezidanto U.E.A.*

Por prezidanto de Societo verki skizon pri kongreso, kiun li devis prezidi, ne estas facile tasko. Se li fantaronas, oni eble diros, ke li kompreneble kaj devige trograndigas; se li plendas, oni supozos ke li tie spertis ian personan malagrablaĵon. Tamen mi cedas al la peto de nia kara Redaktoro kaj verkas ĉi tiujn liniojn pri la Unua Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio, kiu okazis en la bela antikva bavara urbo Augsburg, inter Julio 28a kaj Aŭgusto 3a. Pri la post-kongresa ekskursuo al Munheno kaj pri la antaŭa vizito al la Brusela Eksposicio mi ne parolas, ekscepte por noti la fakton, ke la kongreso donis okazon al multaj samideanoj viziti unue la Esperantan Semajnon en Bruselo, kaj poste la tre ĉarman regionon de la bavaraj montoj kaj Oberammergau.

Ke la verda stelo regis Augsburgon, estis sufice videbla tuj post alveno en la urbon, ĉar ekster la servoja stacidomo la flago donis saluton al ĉiuj alvenintoj.

La speciala eco de nia Augsburga festo estas, unue, la vera spirito de samideaneco, kiu tie regis. Viglaj samideanoj de multaj tre diversaj landoj tre amike kunvenis, tagon post tago, por la laboraj kunsidoj. Ne unu malafabla vorto, ne unu bedaŭrata esprimo. Tameu oni ne dormis dum tiuj kunvenoj. Persone mi sufice ofte — sendube kelkaj diros tro ofte — havis la honoron prezidi agadajn kunsidojn de Esperantistoj, sed neniam ĝis nun mi povis vere taksi la mirindan profiton, kiun oni ricevas per la helpa lingvo. Dum tiuj ses laboraj kunsidoj, oni studis la dudek ses bonege preparitajn raportojn, pri ĉiuj fakoj de nia Asocio, oni aliformigis proponojn, oni plene tradiskutis la tem-kampon, oni voĉdonis sepdek unu rezoluciojn. Nacia

kongreso neniam faris pli kontentigan rekordon — internacia certe ja neniam.

Pri tiuj antaŭparaparitaj raportoj, mi devas diri apartan laŭdon. Cio estis presita per videblaj literoj, sur papero de sama grandeco (Mono-sistemo), kaj numerita de 1 ĝis 26. Ĉi tiuj oni disdonis je la komenco de la kongreso, kaj akceptis kiel jam legitajn. Tamen, por pli konkretigi la ideojn submetitajn, la proponinto aŭ lia reprezentanto parolis kelkajn minutojn, por doni klaran resumon de ĝia enhavo. Tiam la diskuto — neniam disputo — komencigis, kaj jen rusio, jen italo, bohemo aŭ anglo sekvis unu la alian laŭ vere rimarkinda maniero. Speciale notinda estis la vigleco de la bohema amikaro. Ĉiam unuaj por eniri la ĉambrojn, ili plendetale entuziasmigis pri ĉiu temo, kaj verŝis ĉie lumon kaj ŝatindajn ideojn. La prezidanta tasko estis la plej malfacila, kiun mi iam havis. La tagordo estis tiel vasta, ke nur preciza altenado al la temo permisis gian plenumigon. Do eble dum la daŭro de la kongreso, kelkaj trovis min iom tro severa, kaj, se tiuj ekzistis, mi petis ilian pardonon ĉe la fina kunsido. La Urbestrararo akceptis nin tre amike, kaj diris tre afablajn vortojn, kiujn oni povos trovi en la ĵurnalo *Esperanto*, la oficiala kaj bonega organo de U.E.A.

La paroladoj de S-roj Hodler, Staettler kaj Rousseau montris, ke la societo guas la kunlaboradon de tre eminentaj gvidantoj, kaj la sekretaria talento de samideano Schmid plenege montrigis en la eksterordinara bonegeco de la tre malfacilaj kaj devige rapide verkitaj protokoloj de kunsidoj, kiuj ofte nur finigis du horojn antaŭe. Sed sendube la plej rimarkinda plezuro de la kongreso estis nia hejmo. En la bela Hotel Drei Mohren la afable gastmastro S-ro Arras alparolis nin en bonega Esperanto, donis al ni ĉiujn siajn ĉambrojn, kaj sufice multaj kongresanoj estis felicaj trovi ĉambrojn sub lia tegmento. Ke la komuna tag- kaj vespermango okazis ĉe la tre agrabla Bayerischer Hof kaj ne en Drei Mohren ne montras, ke ni ne estus preferintaj tie resti, sed ke malfeliĉe la elspezoj de la vojaĝo devigis la plej multon nur spareme elspezi la spesnilojn, kaj uzi la provizitajn kuponojn sen supertakso. Dum tiu semajno ĉiuj faris multajn amikojn, ĉiuj bonege interkonatigis, ĉiuj bonege komprendis la senton de Esperantisteco kaj Esperantismo, kaj la bezonojn de Esperanto.

Kiam ni disigis, la vortoj de la kara Majstro revenis en la orelojn, kaj ĉiuj kun li diris, ke la Universala Esperanto-Asocio estas la plej grava elmontro de Esperantismo. Ĝi floru kaj kresku ĉe pli rapide en la estonta tempo ol ĝis nun. Tamen ĝi jam posedas pli ol 7,000 membrojn, kaj pli ol 800 delegitoj plenumas siajn servojn tra la tuta mondo.

Al ĉiu, kiu volas vere profiti sian scion de la lingvo, estos plej sage tuj aligi je U.E.A. kaj dum la venonta jaro ĉiu membro kredeble ricevos la Jarlibron de la Asocio, libron ĝis nun ne sufice vidatan, sed libron, kiun mi opinias la plej grava el ĉiuj Esperantaj adresaroj.

La Dua Kongreso de U.E.A. okazos en Antverpeno, kvar tagojn antaŭ la Internacia kongreso de Esperanto. Estas por ni absolute necese, havi kvar plenajn labortagojn, ĉar dum la Kongreso estas tiom da festoj kaj ankaŭ specialistaj kunvenoj, kiujn kelkaj el ni volas ĉeesti, ke alia arango estas neebla. En la nomo de la Asocio mi invitas ĉiujn membrojn veni al Antverpeno la venontan Aŭguston kaj konstati la valoron de sia societo.

Jen listo de la ĉefemoj priparolitaj kaj voĉdonitaj:

Administrado Fako, Revizio de Statutoj, Propagando Esperanta, Kondiĉoj de Delegiteco, Elektado de Lokaj Delegitoj, Pri Grupoj kaj Esperantaj Entrepreneoj Financoj, Konsula Fako, Titolo de Delegito kaj Konsulo, Esperanto Oficejoj, Junuloj, Studentoj, Stipendioj por Vojago, U.E.A. kaj Laboristaro, Sekcioj en Liceoj, Biblioteko, Komerca Fako, Varbado de Kongresoj, Disdonado de Reklamiloj, La Mono-sistemo, Reformo de la Kaledaro, Turismo Gvidfolioj.

## Brita Kroniko.

Pro la Kongresa Raporto ni devis prokrasti ĝis la proksima monato grandan parton de l' Kroniko.

Ni estos tre dankaj, se ĉiuj grup-sekretarioj, kiu ankoraŭ ne faris tion, sendos al ni precizajn sciigojn pri la Esperantaj kursoj, oficialaj kaj neoficialaj, kiuj okazas en ilia grupregiono.

**Afternoon Class.** — For the convenience of those persons who would like to join a class for the study of Esperanto, but cannot be free in the evenings, Mr. M. C. BUTLER, D.B.E.A., intends to hold an afternoon class at his house, 18, *Leigh-road, Highbury, N.*, provided that a sufficient number of pupils present themselves. Further particulars from him at the above address.

**Charing Cross.** — Tiu ĉi klubo rekomencis siajn kursojn post la libertempo, kvankam la tuta membraro ankoraŭ ne revenis. S-ro Blott kondukas la unuan klason kaj la legolibro uzata estas "La Revizoro." La dua klaso estas kondukata de F-ino Barker kaj la libro estas "Pola Antologio."

Paroladetoj kaj iafoge ludoj (ekz. la Esperanta Krikeludo) troviĝas en la programo.

La prezidanto deziras sciigi, ke vizitantoj estas ĉiam kore akceptataj, precipe la samideanoj el aliaj landoj.

S-ro Eustace Miles donis tre efikan reklamon al la klubo en sia jurnalero *Healthward Ho*, kie sin trovas "Punktoj pri la Sano" enpresitaj en paralelaj kolonoj angle kaj Esperante.

La kunveno okazas ĉiumarde je 3.30 posttagmeze, en la *Eustace Miles Restoracio, Chandos-street, Charing-cross*; poste, je la 5a horo la membroj prenas teon kune en la Kafeo.

**Edinburgo.** — Dum la libertempaj monatoj kelkaj el la Edinburgaj samideanoj havis la feliĉon sperti la valoron de Esperanto dum vojaĝoj sur la Kontinento. S-ro Easson promenis tra Germanujo kaj Francujo kaj ĉie, kie li trovis Esperantistojn, estis bone akceptita; S-ro Ford havis kontentigan sperton en Hamburgo, Kopenhago kaj Berlino; S-ro Wight en Danujo, kaj F-ino Munro en Bonn. Dume en hejmlandaj libertempoj kelkaj membroj faris sian eblon propagandi la lingvon, precipe S-ro Fred en St. Andrews kaj S-ro Page en Oban. — Ne forgesu pri la recitalo de S-ro Harrison Hill en Queen's Hall, Edinburgo, mardon, la 5an de Oktobro, je 8 p.t.m.

**Kingston-on-Thames.** — Ne senkuraĝigite de la ĝis-nuna apatio de ĉi tiu plezururbo rilate al Esperanto, la Kingstona anaro entuziasme kunvenis la 1gan de Septembro ĉe 4, *Church-street, Kingston*, la nova kunvenejo, kaj arangis viglan propagandon por la venonta sezono. S-ro Corderey, el *Clark's College, Surbiton*, komencos, la 1gan de Oktobro, novan kurson de instruado je la adreso supre-citita, daŭrigotan ĉiu-merkrede de la 8a ĝis la 9a. Je la 9a okzaos ĉiu-semajne kunveno de la grupo anstataŭ la antaŭaj duomonataj kunvenoj. La elekti de oficistoj rezultis jene: S-ro F. M. Sexton, la konata kaj energia fondinto de la societo, estas difinita por prezidanto anstataŭ D-ro Alexander eksiginta. Por la ofico de sekretario oni nomis S-ron J. Booth. Plie la grupo unuvoĉe elektis S-ron Sexton delegita konsilanto al la B.E.A. La Kingstona anaro tiamaniere konservos tiun reprezentadon malkaſeman kaj sendependan, kiun ili tiel ŝatis dum la jaroj, kiam S-ro Sexton estis ordinara konsilanto de la B.E.A. La sekretario goje ricevos ĉiujn komunikajojn de Esperantistoj aŭ demandojn de lernontoj. — J. BOOTH, Sek.

**Mildmay.** — La tiea societo kunvenos de Oktobro 6 en *The Dalston and Hackney Academy of Music, 262, Dalston-lane*. Granda koncerto kaj la ĉiujara kunveno

okazos la 20an de Oktobro. Je la 13a S-ro M. C. Butler faros paroladon pri "Esperanto—gia historio kaj nuna pozicio," en *Congregational Hall, Victoria-avenue, Finchley*. Por siaj kursanoj en L.C.C. kurso, Kingsland, S-ro Butler jus preparis listojn de botanikaj, zoologiaj kaj aliaj teknikaj vortoj en la Esperanta kaj angla lingvoj — laŭ la vortaroj de Verax. Li sendos ekzemplerojn de tiuj listoj ĉiusemajne al iu petanto, post ricevo de 12 afrankitaj adresitaj kovertoj.

**Norwich.** — En la Municipal Secondary Schools, Duke-street, la kursoj jam rekomencigis. Ili okazos ĉiumarde de la 7a ĝis la 9a vespere. Hon. instruistino, F-ino McDowell.

**Toynbee Hall, 28, Commercial-road, E.** — On Saturday, October 15, at eight o'clock, Dr. John Pollen, our President, will deliver a lecture here, illustrated by lantern-slides, on "Esperanto—Ideal and Practical." All are invited.

**Wood Green kaj Bowes Park.** — En la lasta tempo oni faris vigilan propagandadon en ĉi tiu regiono. La 18an de Septembro S-ro Robertson parolis antaŭ la Presbyterian Literary Society kaj la 24an S-ro Mudie tre konvinke alparolis la anojn de Unity Social Club, kaj poste parolos S-ro G. J. Cox en Unity Hall. Krom tio, multe da laboro faris tiu fervora varbisto, S-ro H. D. Akerman, kaj ŝajnas jam certe, ke la nova kurso farota en la Higher Grade Schools komencigos per sufiĉe multnombra ĉeestantaro. Interesatoj bonvole notu la daton, ĵaŭdon, la zoan, je la 7h.45 vespere, kaj skribu petante sciigojn al S-ro R. Robertson, 3, *Earlham-grove, Wood Green, N.* La grupo esperas post nelonge sin trovi sufiĉe forta, por aliigi al la B.E.A.

## Libraro kaj Gazetaro.

**La Libro de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto.** — Al tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la Esperantistan Kongreson en Washington, sed kiuj volas ĝui kvazaŭ en spegulo la rebrilon de ĝia gloro, tiu ĉi libreto estos plena de intereso. Plena ankaŭ de ĉagreno al tiuj, kiuj havas tempon bedaŭri netrafajn gojojn. Gi estas monumento de la gastameco de niaj Amerikaj amikoj kaj memorigilo pri la bonkoraj klopoj, kiujn ili faris por bonvenigi siajn alilandajn samideanojn. La redaktoro kaj ĉefverkisto estas D-ro B. F. Schubert, kiu priskribas kun prava fiereco la ĉefajn notindajojn de tiu grandioza ĉefurbo de lando, kie la principio de la libereco estas ŝatata preskaŭ ĝis adoro. La libro enhavas multajn belajn ilustraĵojn kaj planon de la urbo Washington, krom mallongaj priskriboj de kelkaj aliaj Usona urboj.—A. E. W.

## Council Meeting, B.E.A.

Held at the offices of the Association on Monday, September 12, with Mr. H. B. Mudie in the chair. Present: Messrs. Akerman, Blott, Chatterton, Cox, Fairman, Colonel Gale, Mercer Hollis, Kalisky, Phillimore, Rolston, Mrs. Sheehan, Misses Blake, Henningsen, Holmes, O'Brien, Schafer. In attendance: Messrs. Ledger, Mann, Wackrill and the Secretary.

**The Proposed "Associates."** — This matter was discussed at length, and finally a resolution approving the principle of adopting associates, subject to legal and other difficulties being overcome, was referred back to the Propaganda Committee.

**Councillors.** — The resignation of Mr. G. L. Browne was accepted with regret, and hearty thanks for his many useful services to the Association.

Many other matters were discussed, but not being of general interest, are not reported here.

## The Board of Education and Esperanto.

Knowing that many teachers and friends would be interested to have particulars as to the exact status of Esperanto with the Educational Authorities in this country, we recently made inquiries which elicited the following information :

(1) The subject of Esperanto was provisionally recognised by the Board of Education in 1905-6 at Keighley Technical School. It was regarded as an experiment, and H.M. Inspector was asked to report specially upon it. H.M.I. reported favourably upon the work, which he said could not fail to possess very considerable educational value. (2) Further applications being received in 1906-7, it was agreed that the Board would recognise Esperanto classes and pay grants wherever the instruction was given in such a way as to ensure its having educational value. (3) Since 1906-7, Esperanto has been treated practically as an ordinary grant-earning subject.

We have also received the following letter :

Ref. T.7254/1b.  
Board of Education,  
Whitehall, London, S.W.,  
27th September, 1910.

Sir,

In reply to your letter of 23rd July last, I am directed to state that Esperanto is included among the subjects for instruction in which the Board pay grants to Evening Schools and Classes under Chapter 2 of their Regulations for Technical Schools. The number of such Schools and Classes to which grants were paid for this instruction for the year 1908-09 was 33.\*

The delay in answering your letter is regretted.

I am, Sir,

Your obedient Servant

(Sd.) H. W. SIMPKINSON.

\* Ĉu la koncernataj instruistoj aſable volos nin detaile sciigi karte pri tiuji kursoj (loko, nombro de partoprenantoj, k.t.p.)?

## The British Esperanto Association (Incorporated).

### CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

C. P. ANDREW, South African College, Cape Town, South Africa  
W. J. BARTON, M.A., 103, Southwood-lane, Highgate, London, N.  
H. B. BIRCH, 11, West View-terrace, Mold, Flintshire; H. EWART,  
Bixley Cottage, Gore-park-road, Eastbourne; Miss A. G. DE  
GRUCHY, 4, Carholme-road, Forest-hill, London, S.E.; Rev. J. H.  
HAWKES, Whangarei, New Zealand; Miss C. HODGSON, 52, Lower  
Stane-street, London, S.W.; G. W. IDDON, 23, Alma-road, Birk-  
dale, Southport; L. O. NEWTON, St. Elba, Napoleon-road, St. Mar-  
garets-on-Thames; L. H. OWEN, The White Building, Fitzalan-  
square, Sheffield; L. F. RAISIN, 12, Links-street, Kirkcaldy, Fife;  
Miss M. SCORESBY-JACKSON, London Temperance Hospital, Hat-  
stead-road, London, N.W.; IRACH J. SORABJI, Central Hindu  
College, Benares City, U.P., India; A. H. WALKER, B.A., 39,  
Montague-road, Cambridge; A. J. WINTERSON, Railway Dept.,  
Hobart, Tasmania.

### NEW FELLOWS.

D. DAVIES, Perth, West Australia; RHODES MARNOTT, Man-  
chester; Dr. A. H. MILLER, Norwich.

### PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

\*Miss BLANCHE DRINKWATER, Clayton-le-Moors; \*Miss ELSIE  
VIVIAN HULL; RICHARD E. VIVIAN, Hull; \*VICTOR A. P. HAYMAN,  
Charlestown, Cornwall.

### PASSED ADVANCED EXAMINATION.

\*Miss LOUISE BRIGGS, Armley, Leeds; \*JOHN HOWARD HORSLEY,  
Bradford.

\* Denotes that the candidate has passed with distinction.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council of the B.E.A. will be held on Monday, October 10, at the offices of the Association, 133, High Holborn, London, W.C., at 6.30 p.m. Following meeting, November 14.

## Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn annoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penkojn (25 spesdekojn) por trilingva empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresacion senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

778. **Pittsburg (Penns.), U.S.A.**—S-ro W. E. Winn, P.O.Box 464, deziras korespondadi kaj interŝangi ilustr. pkartojn kun ĉiulandanoj; preferas kartojn kun portretoj de eminentuloj. Tuj respondos. (72)

806. **Ibrox (Glasgow), Skotlando.**—S-ro Francis Rafter, 8, Westminister-place, deziras interŝangi ilustr. poštkartojn kun ĉiulandanoj, precipe Holandanoj. Tuj kaj ĉiam respondos.

809. **Lipzic R. (Germanujo).**—F-ino M. Liebing, Gemeindestr. 12, deziras korespondi kaj kolektos poštmarkojn. Si respondas ĉiam tui.

810. **Barcelona (Hispanujo).**—S-ino Juan Placiencia kaj Johano Sornez, Calle Mayor del Faubad 25, deziras interŝangi il. pktojn kun ĉiuj gesamideanoj en la tutu mondo. Ĉiam respondos.

811. **North Platte (Nebraska), U.S.A.**—S-ro E. H. Flowers deziras interŝangi ilustr. poštkartojn kun alilandanoj kaj sciigas al siaj ge-korespondantoj, ke lia nova adreso estas laŭsupre.

812. **Ribinsk sur Volga (Rusujo).**—S-ro A. Goldman deziras korespondi kun alilanduloj per poštkartoj ilustritaj. Tuj kaj ĉiam respondos.

813. **Belfast (Irlando).**—S-ro H. A. Magee, 3, Colman-cottages, Stockmans-lane, deziras korespondi postkarte al letete kun alilandanoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

814. **Perranporth (Cornwall), Anglujo.**—S-ro J. H. Tregelles, Trevellans, deziras korespondadi kun ĉiulandaj samideanoj.

815. **Barcelona (Hispanujo).**—S-ro Manuel Capafons, Zad-rras 208b, Poble Nou, deziras interŝangi korespondadon per ilustr. poštarto. Ĉiam respondos.

816. **Belfast (Irlando).**—S-ro G. Keenan, Portfield, Dunmurry, deziras korespondi poštcarte al letete kun alilandanoj. Ĉiam kaj tui respondos.

817. **Barcelona (Hispanujo).**—S-ro Juan Amades, Pen Creu to Tila, deziras interŝangi ilustr. poštkartojn prefere kun karakterizaj tipoj. Nepte ĉiam respondos.

818. **Narkov (Rusujo).**—S-ro V. J. Jakovlev, Chododnogorskij per. No. 12, deziras korespondadi kun instruistoj de mezaj lernejoj B.E.A.-anoj, pri stato de klasika instruado en Anglujo; sin intereso pri la pedagogio, la rusa lingvo kaj historio de literaturo.

819. **Aidin (Turkujo).**—S-ro Salomon Gueron, Banque Ottomane, interŝangas pinarkojn kun la tutu mondo; sendajoj rekomenditaj korespondas en 19 lingvoj.

820. **Aidin (Turkujo).**—S-ino C. Haronian interŝangas pinarkojn kaj korespondas en 19 lingvoj; sendajoj rekomenditaj.

821. **Kirkcaldy (Fife), Skotlando.**—S-ro L. F. Raisin, 12, Links-street, deziras interŝangi ilustr. poštkartojn kun samideanoj de tiu lando. Ĉiam respondos.